

# LA ONDO de Esperanto

*Internacia sendependa magazino en Esperanto*



Februaro  
2008

№2

# LA ONDO de esperanto

INTERNACIA SENDEPENDA MAGAZINO

2008. №2 (160)

**Aperas** ĉiumonate

**Fondita** en 1909 de Aleksandr Saĥarov

**Refondita** en 1991

**Eldonas kaj administras** Halina Gorecka

**Redaktas** Aleksander Korĵenkov

**Konstantaj kunlaborantoj** Tatjana Auderskaja, István Ertl, Dafydd ab Iago, Wolfgang Kirschstein, Aleksej Korĵenkov, Alen Kris, Viktor Kulakov, Glebo Malcev, Floréal Martorell, Valentin Melnikov, Sergio Pokrovskij, Aloísio Sartorato, Serge Sire, Maria Sokolova

**Adreso** RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205, Ruslando

**Telefona** (4012) 656033

**Elektronika poŝto** [sezonoj@kanet.ru](mailto:sezonoj@kanet.ru)

**Hejmpaĝo** <http://Esperanto.Org/Ondo>

**Abontarifo por 2008**

*Internacia tarifo:* 32 eŭroj

*Orienteŭropa tarifo:* 18 eŭroj

*Ruslanda tarifo:* 390 rubloj

*Pollanda tarifo:* 60 zlotoj

*Aerpoŝta aldono:* 5 eŭroj

*Elektronika abono (pdf):* 12 eŭroj por ĉiuj landoj

**Perantoj** vidu la liston sur la paĝo 27.

**Konto ĉe UEA** avko-u

**Recenzoj** Bonvolu sendi *du* ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k.a. al la redakcia adreso.

**Eldonkvanto** 750 ekzempleroj

**Anonctarifo**

*Plena paĝo:* 100 EUR (2000 rubloj)

*Duona paĝo:* 60 EUR (1200 rubloj)

*Kvarona paĝo:* 35 EUR (700 rubloj)

*Okona paĝo:* 20 EUR (400 rubloj)

*Malpligrandaj:* 0,50 EUR aŭ 10 rubloj por 1 cm<sup>2</sup>

Kovrilpaĝa anonco kostas duoble. Triona rabato pro ripetito.

**Donacoj** La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia konto “avko-u” ĉe UEA.

**Represoj** Oni povas represi tekstojn kaj bildojn el *La Ondo de Esperanto* nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

© *La Ondo de Esperanto*, 2008.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2008, №2 (160).

Ежемесячный журнал на международном языке эсперанто.

Журнал зарегистрирован Министерством Российской Федерации по делам печати, телерадиовещания и средств массовых коммуникаций. Свидетельство о регистрации ПИ № 77-9723.

Учредитель и издатель: Горещкая Г. Р.

Редактор: Корженков А. В.

Подписано в печать: 21 января 2008 г.

Цена свободная. Тираж: 750 экз.

Отпечатано в Польше. Presita en Pollando.

## Vortoj de Komitatano Z.

### Kiam ni komprenos la prezidanton?

En iuj landoj oni lasas novan registaron en paco dum cent tagoj antaŭ ol fari la unuan takson pri ĝi. La teamo de Probal Dasgupta gvidas UEA jam duonan jaron. Por grupo, kies anoj vivas dise tra la mondo, eĉ en la reta epoko, tio en efektivo estas malpli longa tempo ol cent tagoj por tiuj, kiuj sidas ĉe sama tablo ĉiusemajne. Tamen, duonjaro estas jam sesono de la tuta regoperiodo konfidita al la estraranoj de nia monda asocio. Kion eblas konkludi, almenaŭ provizore?

Post la UK ekaperis en la organo de UEA longaj artikoloj de Dasgupta kaj aliaj estraranoj. Laŭ ili oni ne scias juĝi, ĉu la estraranoj ne komprenas, kien konduki la asocion, aŭ ĉu temas pri nekompreneo de la leganto, kiu vane serĉas en ili kapteblan fadenon. Ĉu tiel aŭ ĉi tiel, malbone ĉiukaze. La estraranoj unue klarigu al si mem, kaj inter si mem, kion ili volas, kaj poste ili ankaŭ sciuj klarigi tion al la membroj. Ne ĉiu bezonas kompreni ĉion, sed en socia movado la herboradikuloj devas almenaŭ ekfidi, ke la gvidantoj scias, kiel kaj kien stiri la ŝipon. Eble la artikolemaj estraranoj, krome, estas tiom katenitaj de siaj personaj verkostiloj, ke provo verki klare povus impresi ridinde. Malgraŭ la risko István Ertl, eksredaktoro de *Esperanto*, instigis en la komitata listo Dasgupta esprimi sin pli kompreneble, sed Ertl apenaŭ estas nun pli kontenta. La ferma parolado de Dasgupta en Jokohamo tamen permesas esperi, ke li povus trovi la lingvan klavaron, per kiu li tie sciis fari sin komprenata. Ĉu la posta lingvoproblemo venis pro deziro prezenti ion novan, kio diferencigu lin de lia antaŭulo? Tio estis superflua, ĉar post la UK validas la sama strategia plano de UEA kiel antaŭe.

En unu rilato Dasgupta imitas Corsetti. Eble li ne aperas en la retlisto de ĉiu periferio, sed en la plej konataj listoj li emas komenti ĉion kaj danki kaj gratuli pri banalaj raportetoj sen juĝi pri ilia signifo. La prezidanto devus agi pli ŝtatestre kaj ne kiel provincaj aŭtoroj de legantulaĵoj leteroj. Se li volas gratuli klubestron, kiu fiere anoncis novan kurson, li skribu al la anoncinto persone. Tiu ĉi sentas sin tiam intime alparolita kaj la publiko ricevas unu spamecan bagatelon malpli. Ju pli ofte la prezidanto elpaŝas en publikaj forumoj, des malpli pezas liaj vortoj. De kelkaj jaroj la ĝenerala direktoro estas tiu UEA-bonzo, kiu plej malofte elpaŝis publike. Eĉ en *Libera Folio*, kiun iuj etikedas “bulle-rista”, Corsetti aperis multe pli ofte ol Buller. Ne gravas, ĉu la direktoro porciumas siajn dirojn konscie aŭ pro manko de tempo. La rezulto estas, ke liaj vortoj pezas.

Krom pli ŝpareme reeĥi al diskutajoj, la prezidanto farus saĝe, se li farus tion ankaŭ malpli rapide kaj ne kiel Corsetti, kiu rapidis tuj reagi al ĉiu ĝermo de diskuto. En komitata diskuto tio estas malbona, ĉar la diskuto facile estingiĝas. Iuj ne volas kontraŭi la prezidanton kaj por aliaj plua diskuto ne necesas, ĉar la prezidanto jam vortigis la asocian starpunkton.

Prezidanto, ĉu eblas malpli sed pli klare?

*Komitatano Z*

**Pro la kovril-foto** Aneta M. Będkowska, 32-jara polino loĝanta en Britio, ricevis laŭdan mencion en nia 10a Fotokonkurso. La foton pri Aŝura festo ŝi faris en Borujerd (Irano). Fotoj de Aneta estis ekspoziciitaj en Hispanio (2006) kaj en Ĉinio (2007, premio). Krome ŝi venkis en konkurso de poŝtkartoj pri Brajtono.



# Bonvenon al ĉiuj helpemuloj!

En la januara *Ondo* ni jam informis, ke 57-jara germana amiko de Esperanto Peter Zilvar estas proklamita la Esperantisto de la Jaro 2007 pro diversflanka agado por kaj per Esperanto en Herzberg — la Esperanto-urbo. Li afable konsentis respondi niajn demandojn.

## Kiel impresis vin la informo, ke vi iĝis la Esperantisto de la Jaro?

Nu, ja esperantisto en la kutima senso mi ne estas, sed konstanta Esperanto-aktivulo, ĉar mi volas helpi plibonigi la Esperanto-movadon por krei ion daŭrepovan kaj videblan je favoro de nia lingvo-komunumo.

**La internacia elektantaro laŭreatigis vin “pro diversflanka agado por kaj per Esperanto”, aparte menciinte kelkajn flankojn. Unue temas pri “serio de altnivelaj seminarioj kaj ekzamen-sesioj” en la Interkultura Centro Herzberg/Germana Esperanto-Centro...**

Nia Esperanto-Societo Südharz ekzistas ekde 1976. En novembro 2001 ni brile festis nian 25-jaran jubileon en la kavalira salono de la kastelo en Herzberg. Entute estis aktiva asocio por Esperanto kun gastoj el preskaŭ 50 landoj, kun kurs-ofertoj, konstanta agado en la gazetaro (aperis jam pli ol 1000 gazet-artikoloj pri diversaj agadoj).

Ekde 1999 ni funkcias kiel klerigejo por Esperanto. Jam pli ol 35 famaj Esperanto-sciencistoj kaj elstaraj fakuloj instruis en Herzberg: prof. John C. Wells, d-rino Katalin Kováts, prof. Erich-Dieter Krause, d-ro Detlev Blanke, d-rino Ilona Koutny, Aleksander Korĵenkov, Stefan MacGill, Zsófia Kóródy, k.a. Studantoj povas akiri studkreditpoentojn kaj post ekzamenoj povas fariĝi Esperanto-instruistoj.

Por la Esperanto-movado ni uzas la nomon Germana Esperanto-Centro, ĉar en la sama domo ni aktivis por diversaj asocioj: por nia regiona Esperanto-Societo Sudharzo, por Germana Esperanto Asocio (GEA) kiel filio por klerigado kaj kulturo, kaj por AGEI (Asocio de Germanaj Esperanto-Instruistoj) sub gvido de ĝia verva prezidantino Zsófia Kóródy.

Por la ekstermovada agado ni uzas la nomon Interkultura Centro Herzberg (ICH), ĉar ni aktivis ankaŭ en interkulturaj dialogoj kaj temoj por germanlingva publiko. Ankaŭ per tio ni plibonigas nian reputacion.

**Ĉu vi havas kontaktojn kun aliaj Esperanto-centroj kaj klerigejoj?**

Ni klopodas kunlabori kun aliaj Esperanto-centroj laŭ niaj laborfortoj. En 2005 kaj 2006 ni organizis en Herzberg fakseminarion pri Esperanto-Bibliotekoj kaj Arkivoj, per helpo de nia katalogo interŝanĝas materialojn, estas en reta kontakto kun aliaj centroj. Ni interagadas kun Germana Esperanto-Instituto, Internacia Esperanto-Instituto (IEI en Nederlando), ILEI kaj kun Interlingvistikaj Studoj en Poznano, invitas eksterlandajn prelegantojn, fakulojn, organizas seminariojn por klerigado de Cseh-instruistoj kun IEI kaj estas daŭre malfermitaj al ĉiuj novaj iniciatoj.

**Tre grava estas via ekstera agado, kiu kulminis per oficialigo de Herzberg kiel la Esperanto-urbo. Kiel Esperanto nun “vivas” en la urbo?**

Jes, fakte tio estas la kulmino post kelkdekjara celkonscia aktivado. Jam ekde la mezo de la sesdekaj jaroj elstara esperantisto Joachim Giessner (IFEF-kaj GEFA-prezidanto), kiu estis estro de la stacidomo en Herzberg, kontaktis lokajn politikistojn, verkis gazetartikolojn, organizis la germanan kaj internacian fervojistan Esperanto-movadon, tradukis kaj eĉ verkis Esperanto-instrulibron por turkoj kaj tradukis pli ol 400 kantojn al Esperanto, ktp.

Kompreneble ni daŭrigis lian aktivadon por kaj per Esperanto. La longjaraj multifacetaj agadoj kulminis la 11an de julio 2006 en formo de unuanima urbkonsilantara decido doni al nia urbeto Herzberg la oficialan kromnomon (titolon) “Herzberg — la Esperanto-urbo”. Centoj — ĉefe eksterlandaj esperantistoj — skribis kaj dankis al urbestro Gerhard Walter kaj al nia Germana Esperanto-Centro por la elstara daŭrepova sukceso.

Ni povos verki apartan raporton pri niaj multflankaj agadoj en la urbo Herzberg, ja ne nur estas Esperanto-instruado kaj informado, internaciaj projektoj, dulingvaj ŝildoj, esperantlingvaj manĝokartoj, ktp.

**Laste, sed ne balaste, la formulo de via honorigo, mencias kunlaboron inter Herzberg kaj Góra.**

Danke al nia ege aktiva urbestro Gerhard Walter ni sukcesis ekde marto 2005 oficialigi Esperanton kiel pontlingvon



por kontaktoj kun nia pola ĝemelurbo Góra en Malsupra Silezio. Nemalmultaj esperantistoj el Silezio ĉeestis la kunsidojn dum nia organiza vizito en la urbodomo de Góra.

Ni klerigis en somero 2005 instruistinojn el Góra je nia kosto. Tuj poste ili ekinstruis, kaj dum somero 2006 kaj denove en 2007 okazis sukcesaj dusemajnaj lingvoferioj en Herzberg kun gelernantoj el la gimnazioj en Herzberg kaj Góra. Konstante ni provas daŭrigi la kontaktojn kun la novaj aktivuloj en Góra.

**Vere giganta agado. Vi ja faras ĝin ne sola?**

Tio absolute ne eblas. Mankas esperantlingvaj fakuloj sur multaj terenoj por krei vere unikan modelurbon. Unuavice dum la lastaj kvar jaroj aktivis Zsófia Kóródy, kiu ankaŭ estas la vicprezidantino de ILEI kaj prezidantino de AGEI. Ekzemple, ŝi instruas bonkvalite Esperanton en la lernejoj de Herzberg, organizas la bibliotekon kaj arkivon kaj instruas niajn kunlaborantojn de Job-Center rilate al praktikaj laboroj kiel listigoj de la materialoj por la arkivo kaj biblioteko, kaj zorgas pri retaj taskoj.

Kelkaj aliaj Esperanto-geamikoj helpas, ekz. Marika Frense pri varbbruŝuroj kaj junulara agado, Otto Kern pri instruado en bazaj lernejoj, Ulla Zilvar pri librotenado, nemalmultaj kunlaborantoj de Job-Center, volontuloj kiel Veronika Acsádi, Sándor Hideg, Giancarlo Fighiera, Rita Valčiukaite k.a. Tamen laŭ nia reala imago tio ne sufiĉos por vera kaj prezentbla Esperantomodelurbo. La teamo ankoraŭ devos kreski multflanke. ☞ pĝ. 4

## Ĉu ICH ricevas helpon de la urbo, de GEA, de internaciaj esperantistaj asocioj?

Vere la urbo Herzberg sub urbestro Gerhard Walter kun ĉiuj kvin surlokaĵaj partioj kaj la urboadministracio kune kreas unikan modelon por Esperanto. Ĝuste la urbestro, kiu dum jaroj laboradis, konvinkis kaj lobiis por Esperanto, vere meritis la titolon “Esperantisto de la jaro”. Li estas simpatia, verva kaj havas kune kun ni grandajn esperojn. Nur la urbo kiel preskaŭ ĉiuj urboj en Germanio tute ne havas monon. Sed la urboadministracio helpas, ekzemple, per kontaktoj, ĝemelurbaj pontlingvaj aktivadoj, administrado, informado, ankaŭ laŭjure, ktp. Nun la Esperanto-movado kaj Herzberg kiel Esperanto-urbo estas kvazaŭ geedza paro, do nun ni troviĝas en la sama boato.

Ni devas danki al GEA por moralaj kaj financaj subtenoj, UEA por escepta diplomigo de ICH, porokazaj financaj subtenoj de kelkaj grupoj, unuopuloj. Herzberg — la Esperanto-urbo estas tre grava loko por GEA, ĉar multaj sukcesoj jam estas videblaj, eĉ esperantlingvaj tekstoj sur la hejmpaĝo de la urbo Herzberg. Tamen la plej grandan parton por la kurantaj aferoj kaj objektoj ni iel mem devas financi. Se estus malavaraĵaj subtenantoj, la evoluigproceso povus marŝi multe pli rapide.

### Kio pri la estonteco de ICH?

Ĉiutage ni multe laboras, ĉefe estas korespondado, instruado, lernejoj projektoj, biblioteka laborado, urbaj kontaktoj, interagado kun nia ĝemelurbo, ktp. Kompreneble ni daŭrigos niajn ĉeftaskojn: instruadon, klerigadon kaj la konstruadon de nia komuna Esperanto-urbo. Do, ICH bone vivos, se niaj sanstatoj restos stabilaj kaj, kompreneble, se pluaj aŭ multaj kompetentaj esperantistoj konstante kunkonstruos.

### Kion vi opinias pri la estonteco de Esperanto?

Se Esperanto estus pli videbla en la normala socio, ni povus atingi daŭropovajn sukcesojn kaj eniri en la normalajn vivokanalojn, do ne nur en interreta agado kaj dum kongresoj, kunsidoj, ktp. Se la modelo “Herzberg — la Esperanto-urbo” vere estos prezentebila por ĵurnalistoj el la tuta mondo, televidostacioj, tiam la tuta Esperanto-movado povos konstante prezenti videblajn sukcesojn. Proverbo diras, ke unu videbla bildo valoras pli ol mil argumentoj. Jam nun multaj Esperanto-grupoj aŭ urboj volas imiti nian ekzemplon. Sed dum la venontaj jaroj ni nepre ankoraŭ devos

stabiligi la modelon, mankas ankoraŭ fakuloj kaj financaj rimedoj por povigi fakulojn por ellaborado de turismaj libroj, varbmaterioj por diversaj celgrupoj, kontaktoj al universitatoj, fondaĵoj, specialaj migradvojoj, kulturo, ktp.

### Ĉi tiu intervjuo aperos en *La Ondo de Esperanto*. Kiun opinion vi havas pri ĝi?

Laŭ nia opinio *La Ondo de Esperanto* estas vere sendependa (tio gravas pro la neŭtraleco), elstara kaj altnivela magazino, kiu raportas pri multaj temoj en agrabla stilo. Ĉiumonate ni ĝojas pri la regula apero. Ĝi estas bonega varbilo por nia movado.

### Ĉu la Esperanto-urbo bezonas pluajn civitanojn, kiuj kapablas amike organizi praktike kaj fake en Esperanto?

Jes nepre. La unuaj baldaŭ translokiĝos. La vivkondiĉoj (infrastrukturo, naturbeleco, prezoj, ktp.) estas vere favoraj, kelkaj interesiĝantoj jam komparis tion kun siaj landoj. Kiu ekzemple povas krei bonkvalitajn Esperanto-

menuojn kaj bonkvalitajn esperantlingvajn manĝokartojn, instrui en infanĝardenoj, organizi Esperanto-radio-stacion, verki dulingvajn turismajn librojn, envolvigi la enloĝantaron, ktp.? Bonvenon al ĉiuj helpemuloj!

### Sekvas du tradiciaj demandoj. Unue: al kiuj personoj vi mem donus viajn voĉojn, se vi estus elektanto?

Al nia urbestro Gerhard Walter, kaj al la vicurbestro Ulrich Schramke, tute klare. Laŭ nia opinio, la movado jam havas multajn romanverkistojn kaj ret-agantojn, sed homoj por praktikaj bezonoj preskaŭ tute mankas.

### Kaj fine: kiujn tri librojn en Esperanto vi kunprenus, estante ekzilita al neloĝata insulo?

Unue la novan grandan vortaron por germanoj de prof. Erich-Dieter Krause, *Liberekonomion* de Silvio Gesell, kaj la novan rektmetodan lernolibron (eble en diverslingvaj versioj) de Stano Marček. Neniam oni scias, ĉu al neloĝata insulo venos pluaj insulanoj, ĉu ne? Kompreneble, nepre mi kunportus Esperanto-flagon!

## Novjargastoj en la Esperanto-urbo

Tuj je la jarkomenco 2008 prof. Amri Wandel (prezidanto de Israela Esperanto-Asocio) kaj hispandevena neŭro-psikologino Encarna Teruel venis al Herzberg por sperti propraokule la unuajn videblajn rezultojn en la ankoraŭ juna Esperanto-urbo.

Impresis ilin la ampleksa fakbiblioteko kun pli ol ses mil titoloj (kun granda kolektaĵo de vidbendoj, DVD-oj, KD-oj) kaj gazetarkivo kun pli ol 12 mil diversaj eroj.

Ili testis la unuajn Esperanto-menuojn kaj faris multajn fotojn pri rondirvojoj en Herzberg, ekzemple laŭ la multaj vojindikŝildoj “Esperanto-Centro”. La Joachim-Gießner-monumento ĉe la stacidomo (*vd. sube*) ĝojigis la gastojn. La unuaj grandaj dulingvaj ŝildoj sur publikaj konstruaĵoj estis fotindaj celoj. La gvidantino en la bela faktrabdoma kastelo (lulilo de la fama Welfoj-dinastio) bonvenigis la gastojn en Esperanto. Foje eĉ infanoj en la urbo jam salutas en Esperanto per freŝa “saluton”.

Ili ankaŭ rondpromenadis sur la nova itinero Akvo-8 kun pli ol 25 informtabuloj, sur kiuj troviĝas koncizaj tekstresumoj ankaŭ en Esperanto. Amri kaj Encarna trovis tute novan dulingvan tabulon ĉe la natura Lonau-akvofalo.

ICH





# La Zamenhofa Tago festata tra la mondo

**Pollando.** La Zamenhofa Festo en **Toruń** estis organizita kunlabore kun urbaj kulturinstitucioj kaj kun la Internacia Studumo de Turismo kaj Kulturo (Bydgoszcz), de kie venis pli ol 20-persona grupo de instruantoj kaj studentoj. La programo okazis sinsekve en la liceo *Kopernik*, kie iam lernis “la patro de Esperanta poezio” Antoni Grabowski; en la toruna Etnografia Muzeo, kiu dum multaj jaroj utiligas Esperanton; en la muzeo Kopernik, kiu ofertas aŭdo-vidan spektaklon “Toruń dum la epoko de Nikolao Kopernik” kun surbendigita komento en Esperanto, elektebla inter ok lingvoj. La ĉefa evento estis internacia koncerto en la Junulara Kulturdomo por esperantista kaj ĝenerala publiko kun prezentoj de junulara teatro *Studio “P”*, du torunaj junularaj dancensembloj, kaj internacia muzikensemblo *Afrika Umba* kiun formas afrikaj esperantistoj el Bydgoszcz. (Teresa Nemere)

En **Koszalin** aro da lokaj esperantistoj, sub gvido de s-anoj Marian Łaba kaj Waldemar Nowakowski, festis la Zamenhof-tagon ĉe la monumento omaĝe al la Majstro. (Andrzej Broda)

**Ruslando.** 15 dec en la muzeo de aktoroj en **Peterburgo** la urba societo *Espero* festis la naskiĝtagon de Zamenhof kaj sian 115-jariĝon. Partoprenis pli ol 70 personoj. Lernantoj kantis kaj prezentis skeĉojn en Esperanto, ankaŭ Mikaelo Bronŝtejn kantis. La feston partoprenis ĵurnalistoj kaj televida grupo, kiuj intervjuis la prezidanton de *Espero*, Anna Butkeviĉ. (Boris Kondratjev)

Je la sama tago en **Peterburgo** okazis Esperanto-koncerto en la kulturpalaco Ŝelgunov. La koncerton komencis blinduloj el E-klubo *Amikaro*: Andreo Bednjagin deklamis versaĵon de Baghy, Valerij Jevsejev prezentis kantojn en sia traduko, Anna Fomina kantis bone konatajn belajn Esperanto-kantojn. Arĝenta duopo de Ludmila Titova kaj Vladimir Kosarev prezentis rusajn kantojn kaj romanojn. Fine sian arton montris Esperanto-koruso *Blua Ponto* kun 13 Esperantaj kantoj burleskaj kaj seriozaj. La centkapa publiko dronigis la koruson en torento da aplaŭdoj. (Anatolo Sidorov)

En **Moskvo**, okaze de la Zamenhofa Tago, Valentin Melnikov estis intervjuita de la tutruslanda radiostacio *Majak* (Lumturo) por semajnfina distra-kleriga programo. (I.B.)



Zamenhofa Tago en la japana ĉefurbo

**Japanio.** Zamenhofan Vesperon, alinome Esperanto-Feston, kunokazigis ok E-grupoj en **Tokio**. En la unua parto prelegis Usui Hiroyuki pri Esperanto-literaturo (li eldonis siajn tradukojn el William Auld). La duan parton malfermis raportoj de la 92a UK. Diskuton pri la movado post la UK gvidis Inumaru Fumio. 80 homoj ĉeestis. (Syozo Keiko)

Esperantistoj de gubernio **Gunma**, kunvenis 22 dec por ĝenerala kunsido kaj Zamenhofa Festo. Diskutinte la agadon en 2007 kaj 2008, oni prezentis sin kaj ludis “bingon” pri Eo. Fine estis bankedo en najbara restoracio, kie d-ro Tadokoro Sakutaroo deklamis la paroladon de Zamenhof en la unua UK, Nagai Hiroyuki ludis bele per fingroj, kaj Hori Yasuo ludis komike per vjetnama kaj havaja nazmuzikiloj kaj plasta botelo. (Hori Yasuo)

**Irano.** IREA (Irana E-Asocio), trovis la Zamenhofan Tagon oportuna momento por paroli pri Zamenhof kaj Esperanto. La prezidanto de IREA, A.M. Mamduhi, parolis, interalie, pri la himno de Esperanto, kiun oni poste komune kantis. Je la sama tago, 6 personoj el 11 kandidatoj sukcese plenumis la Internacian Ekzamenon de UEA/ILEI. (Simin Emrani)

**Malto.** Malta E-Societo okaze de la Zamenhofa Tago okazigis bankedon, kiun partoprenis Llibert Puig kun sia familio (Sabadell, Katalunio), kiu feriiis en Malto. Ĉiu partopreninto ricevis ekzempleron de la libro *Printempa Danco* de la malta poeto M.F. Bezzina, kiun tradukis Carmel Mallia. (MES)

**Litovio.** 186 esperantistoj el Litovio, Pollando, Latvio, Belorusio kaj Ruslando kunvenis en Kaŭno por la tradiciaj Zamenhof-Tagoj 2007. Post la antaŭtagmeza kongreso de LitEA, festprelegis pri *Zamenhof kaj zamenhofologio* Aleksander Korĵenkov, kiu ankaŭ anoncis la rezultojn de *Liro-2007* kaj de *La Esperantisto de la Jaro*. Jevgenij Gaus prezentis diversajn projektojn de E@I. Sekvis du koncertoj kaj amika kunestado en kafejo. La sekvan tagon oni ĉe komuna tablo interŝanĝis opiniojn pri la esperantista agado. 75 personoj abonis *Litovan Stelon*, 20 personoj kotizis al UEA, kaj 52 al LitEA. Pri la Tagoj vaste informis litoviaj amaskomunikiloj kaj novaĵ-agentoj. (Povilas Jegorovas)

**Finnlando.** Trideko da esperantistoj kunvenis 15 dec en la oficejo de EAF en Helsinko por la lasta aranĝo en la jaro de la 100-jara jubileo de EAF. Ĉiuj estis regalitaj per tradicia jula trinkaĵo *glogi* kaj spickuketoj *piparkakut*. Anja Karhiainen kaj Patrik Austin deklamis, kantis, ludis kaj vokis aliajn kunkanti kaj -deklami. Saliko prezentis amuzan poemon kaj onklo Tomaso gajajn bestokantojn. Kune ni kantis julajn kantojn. (Tiina Oittinen)

**Bulgario.** 14 dec en la kafejo de la esperantista kulturdomo D-ro Ivan Kirĉev (Razgrad) unuafoje en la lando estis prezentita ekspozicio pri la esperanta novelo. La tradukon de la paneloj en la bulgaran faris Ljubomir Trifonĉovski. La ekspozicio poste gastos en Sofio kaj aliaj urboj de Bulgario. (Ivanna Maĝarova)

**Germanio.** La Zamenhof-festo en la Esperanto-urbo Herzberg okazis 15 dec, post interlingvistika kurso de d-ro Detlev Blanke. Ĉ. 30 gesamideanoj kunvenis en la hoteleto *Goldener Hirsch* (Ora Cervo), kie ili, post komuna vespermanĝo kantis Kristnaskajn kantojn en Esperanto kaj babilis. S-ta Nikolao (Harald Schicke) kune kun anĝelino (Zsófia Kóródy) disdonis donacetojn el granda sako. Do, ĉiuj ĝojis pri tio, poste kantis kaj babilis. Prof-ro Rüdiger Sachs (prezidanto de ISAE) rakontis pri sia nova traduko *Ĵim la migrulo* de Siegfried Stampa. Komuna libroaŭkcio amuzis la ĉeestantojn. (ICH)

**Serbio.** En Niŝ la Zamenhofan Feston de la fervojista Esperanto-societo *Mile Veličković* gastigis Serbia fervojista entrepreno. La festo komenciĝis per la himno de Esperanto kaj prelego pri Zamenhof. Sekvis realeca prezentaĵo *Renkontiĝo de Zamenhof kaj Grabowski*, bela kantado de du esperantistinoj, dancoj kaj kantoj de la junulara fervojista dancgrupo, interesa prelego de Tereza Kapista pri Japanio, kaj prezentaĵo de novaj Esperanto-libroj. Fine estis neformala festado kun manĝado, tostado kaj kantado, dum ekstere neĝis kaj frostis. (Zoran Ĉiriĉ)

Komence de la festkunveno de la E-societo en Senta (Vojvodino) oni omaĝis per unuminuta silento al la forpasinta elstara esperantisto Ludoviko Sekereŝ. Siniŝa Veličković, prezidanto de la societo, prezentis trafan referaĵon pri Zamenhof. En la sekvinta poezia matineo estis prezentataj verkoj en la serba kaj hungara lingvoj, kaj tradukoj en Esperanto. (Boriŝa Miliĉević)



Reza Kheirkhah en Kaohsiung

**Tajvano.** Ĉ. 70 personoj kunfestis la Zamenhofan Tagon ĉe Wenzao Lingva Kolegio en suda urbo Kaohsiung. Post la Esperanto-himno *La Espero*, salutoj, bonvenigo kaj legado de gratuloj estis donita jara raporto pri la Tajvana Esperanto-Movado. Prelegoj, kantoj, libroekspozicio, piedomasago (senpage), flagodanco kaj aliaj programeroj kompletigis la programon. Ĉe la antaŭa informado 500 personoj ricevis informilojn; 25 studentoj kaj 6 nestudentoj esprimis deziron lerni Esperanton. (Cho Chao-Ming)

**Nepalo.** Jarkunveno de NEspA okazis 15 dec en la Esperanto-Domo, Thamelo. Post raportoj oni diskutis la agadon de NEspA kaj la venontan Azian E-kongreson en Barato. Posttagmeze estis bruligita kandelo por festi la Zamenhofan Tagon. Mukunda Pathik, Craig Meulen (Germanio), Narandra Bhattarai, Navian Lal Ŝresta kaj aliaj prelegis kaj komentis pri la vivo de Zamenhof kaj la lingvo mem. La programo finiĝis per manĝado de bongustaĵoj kuiritaj de Mahendra Dhakal kaj aliaj gejunuloj. (Bharat K. Ghimire)

**D.R. Kongo.** 42 esperantistoj el ses urboj de DR Kongo renkontiĝis 13–16 dec en la urbeto Mbanza-Ngungu. La programo enhavis lecionojn, kunvenojn kaj prelegojn, interalie, pri Zamenhof kaj pri lia verko *Esenco kaj estonteco...* kaj konversacian rondon *La kialo dediĉi tiom da tempo kaj energio al la Afero Esperanto*. Esperanto-instruistoj en sia fakkunveno decidis starigi landan sekcion de ILEI. Konga Esperanto-muzikisto Junior Ngangu dum tiuj tagoj igis la lokon tre agrabla per siaj kantoj, kiujn ĉiuj regulaj partoprenantoj ĝoje kantis. Dum la fermo la urbestro informis la partoprenantojn pri la apogo senkondiĉa al la Esperanto movado en Mbanza-Ngungu kaj pri la deziro eklerni la lingvon. Lokaj televido kaj radio dediĉis programojn al Esperanto. (Aimé-Florent Ntoto Zola)

**Argentino.** Bonaeraj esperantistoj kunvenis en la sidejo de la Bonaera Esperanto-Asocio kun siaj geamikoj kaj simpatiantoj por festi la mondan Esperanto-Tagon kaj por interparoli, interalie, pri la Universala Kongreso, kiun ili invitis al sia urbo por la jaro 2012. (R.Sartor)

**Nederlando.** Internacia Esperanto-Instituto en Hago aranĝis Zamenhof-feston por ĉ. 30 lokaj esperantistoj kaj gastoj el kelkaj landoj. Pri “Zamenhof kaj Litovio” prelegis Gražina Opulskienė el Mažeikiai (Litovio). En la programo estis ankaŭ komuna tagmanĝo en apuda restoracio, gitarludado de Vud ten Hagen, prelegeto de Piet Buijnsters pri *Morto en Venecio* de Thomas Mann, mallonga skeĉo. La festo finiĝis per gustumado de rusaj kukoj, faritaj de Julia Batrakova, kaj de kelkaj litovaj specialaĵoj. (Povilas Jegorovas)

**Svislando.** La tuta instruistaro de la privata lingvolernejo *Interlangues* vizitis la Esperanto-Domon en Ĉaŭdefono kaj tie frandis kaj fromaĝan fonduon kaj enkondukon al nia lingvo, danke al la prezidantino de KCE, Perla Martinelli, en tre agrabla etoso. Al la prezento kontribuis tri mallongaj filmoj. La publiko metis multajn interesajn demandojn, ricevante kontentigajn respondojn. (HeKo)

**Katalunio.** Kataluna Esperanto Fervojista Asocio dum 15–16 dec disvastigis Esperanton per budo starigita en la *Foiro de Asocioj* en la ĉefa promenejo de L’Hospitalet de Llobregat. (Martí Guerrero)

Kunvenintoj en Niŝ spektas la skeĉon pri Zamenhof





## Ludoviko Zamenhof revenas

“Ludoviko Zamenhof revenas Bjalistokon”, — anoncis per grandega titolo la tagĵurnalo *Gazeta Wyborcza*. Kompreneble, temas ne pri Ludoviko Lazaro Zamenhof, la kreinto de Esperanto, sed pri lia nepo Ludoviko Kristoforo — la ambasadoro de Bjalistoko kaj Esperanto en la mondo.

La 8aj Bjalistokaj Zamenhof-Tagoj estis organizitaj laŭ la metodo, pripensita jam en la 1a jarcento en Galilea Kano: la plej interesa evento okazas fine.

La organizantoj — Bjalistoka Esperanto-Societo kaj Fondajo Zamenhof — komencis la Tagojn per prelegoj ĉe la Universitato. Poste, dum la naskiĝregalo en la kafejo *Fama*, esperantistoj proponis al la partoprenantoj du grandegajn tortojn (entute 34 kg!) kaj riĉan programon, kiu enhavis elementojn de la pola, juda kaj ortodoksa kulturoj. JoMo komencis sian spektaklon en la koncertejo kaj finis ĝin nokte en la esperanta klubo.

Post la piknika tago la atmosfero iĝis pli kaj pli varma. 17 dec dum la festa kunsido de la Urba Konsilantaro, Ludoviko Kristoforo Zaleski-Zamenhof estis honorita per la diplomo de la Honora Civitano de Bjalistoko. Li ricevis la sim-bolan ŝlosilon de la urba pordego, belan pentraĵon kun la palaco de Branicki (la ĉefa urba vidindaĵo), kaj grandegan rozbukedon.

En sia mallonga parolado Ludoviko Kristoforo dankegis ne nur la urbajn konsilantojn, kiuj decidis honori lin, sed ankaŭ sian avon, sen kies meritoj ne okazus la festo. Li ŝercis: “La urbo Bjalistoko estis ĉiam proksima al mia koro, sed fakte bjalistokano mi estas apenaŭ unu tagon”. Rememorante alian Honoran Civitanon de Bjalistoko, marŝalon Józef Piłsudski, li aludis al sia avo kaj diris: “En Pollando ankaŭ lin oni nomis Avo kaj amis lin”.

Post la oficiala parto de la festa kunsido ĉiuj partoprenantoj volis gratuli persone, ĉiuj ĵurnalistoj deziris tuj fari intervjuon, ĉiuj fotistoj samtempe foti... Finfine la ĉarma “kaoso” pasis kaj, kiel la lastaj, proksimiĝis reprezentantoj de la urba futbalteamo *Jagiellonia*, kiuj donacis al la nova Urba Civitano teaman koloran ŝalon kaj bondeziris al li.

Speciale por nia gasto Andrzej Lechowski, la direktoro de la Podlaĥia Muzeo, ripetis sian prelegon “Bjalistoko en okuloj de Ludoviko”, per kiu oni komencis la 8ajn Zamenhof-Tagojn.

**Ela Karczewska**



La lastan donacon al la plej nova Honora Civitano de Bjalistoko faris piedpilkistoj (Fotis Edyta Wolosik)

## KIES: unuafoje internacia

14–15 dec, ĉi-foje en Jerusalemo, okazis jam la okan fojon Komuna Israela Esperanto-Semajnfino (KIES). Partoprenis rekorda nombro de pli ol sesdek personoj, inter kiuj estis ses eksterlandanoj el Nederlando, Danlando kaj Japanio.

Inter la gastoj troviĝis la nederlandaj aktivuloj Ans kaj Hans Bakker kaj Takashi Ago, direktoro de Esperanto-Populariga Asocio (EPA) de Oomoto, kiu estis oficiale delegita de Oomoto. Takashi Ago renkontis plurajn israelajn gravulojn, kiel vicurbestron de Jerusalemo, parlamentanon, kaj direktoron de la ministerio pri eksteraj aferoj (ĉiuj aŭdiencoj okazis en Esperanto).

Dank’ al la eksterlandaj gastoj regis internacia agrabla etoso, unuafoje en nacia kunveno en Israelo.

Okazis ekskursoj en la orienta Jerusalemo, en la universitata kampuso (botanika ĝardeno) kaj vizito al la Scienca Muzeo apud la Jerusalema Universitato.

Ankaŭ la endoma programo estis rekorde varia kaj abunda: kulturaj, muzikaj kaj klerigaj programoj, pluraj ili estis dediĉitaj al Oomoto kaj Japanio. Interalie okazis prelego pri Roterdamo, la urbo de la UK en 2008, kaj muzika prelego pri la grupo *Akordo*. La okazaĵon organizis kaj gvidis Nava Cinori (administrado) kaj Amri Wandel (programo).

**Amri Wandel**

## AS ĉiam pli populara

Ekzistas esoj de du specoj — unuaj emas festi novjaron kun siaj familianoj kaj trankvile atendi la jarlimon, sed aliaj ŝatas partopreni en buntaj aranĝoj, amuziĝi en granda kompanio kaj trovi novajn amikojn.

Tiujn duajn oni povis trovi dum la tradicia Ago-Semajno (AS), kiu pasis de 27 dec ĝis 2 jan en Malborko, bela urbo kun riĉa historio, kiu lokiĝas en la norda parto de Pollando. La Semajno enhavis ne nur novjaran balon kaj distran programon, sed ankaŭ sufiĉe multe da programoj por ĉiu partoprenanto. Ankaŭ ekstera publiko povis trovi por si multon dum kultur-lingva festivalo kaj sekvanta koncerto. Por konatiĝi ne nur kun Malborko al partoprenantoj estis proponitaj ekskursoj al Gdansk kaj Pelplino kaj kolbasrostado en Tczew.

Nombro da partoprenantoj kreskas de jaro al jaro. En la Malborka AS partoprenis 206 personoj de Eŭropo, Azio, Afriko kaj Ameriko — pli multe ol en la pli tradiciaj IF kaj IS en Germanio. La venonta AS okazos la unuan fojon ekster Pollando — en Slovakio.

**Aleksej Korĵenkov**



## Infanoj, junuloj kaj plenkreskuloj ĉe la 6a NR en Germanio

Plej impresa dum la Novjara Renkontiĝo (NR) estas eble la granda kvanto de infanoj kaj junuloj ĝis 16 jaroj. Ĉi-foje, al la 6a NR, organizata de *EsperantoLand*, venis 56 da ili, kiuj dividiĝis en diversajn laŭaĝajn subgrupojn — estis la rondo de 14- ĝis 16-jaruloj, plejparte denaskaj; estis grupo laŭaĝe iomete sub tiu, kiu vagadis tra la domo ĉiutage produktante kelkminutan filmeton; estis teatra grupo, kiu fine surscenigis teatraĵon; kaj estis pliaj grupoj de infanoj, kiuj manlaboris, kreis bestojn, pentris, desegnis, dancis, aŭskultis fablojn, partoprenis en safaria luda posttagmezo, konkursis tablotenise, ludadis aŭ ekskursis al naĝejo. Ĉio ĉi sub la sperta gvidado de Christoph kaj Ines Frank, kiuj kun deko da helpantoj aranĝis ĉion ĉi.

Sed, infanoj kaj junuloj de tiu aĝo ne venas solaj — ĉeestis inter la entute 139 partoprenantoj el 13 landoj ankaŭ okdeko da plenkreskuloj, sufiĉe por ĝui interesajn interparolojn kaj povi bone amuziĝi. Al tio kontribuas certe ankaŭ la fakto, ke NR estas bele internacia kaj germanoj jam delonge estas malplimulto: tri kvaronoj de la partoprenantoj venas el eksterlando, de Ottawa en Kanado ĝis Novosibirsk en Siberio, de Norvegio ĝis Hispanio; el pluraj landoj venis po kelkaj, dudeko ĝis trideko el la najbaraj landoj Belgio, Francio kaj — bela surprizo — 19 homoj el Svislando, kie Esperanto ŝajne iom reviviĝas.

Ĉi-jare okazis *Magia Vespero*, en kiu ok sorĉistoj prezentis diversajn magiaĵojn, ĵongladon, kreis balonajn bestojn,

estis alivestitaj kiel gigantoj kaj fine kovris la scenejon kaj grandan parton de la salono per (artefarita) neĝo — je la grandega amuziĝo de la infanaro. (Jes, ankaŭ polvosuĉiloj povas efiki magie...) En alia vespero jOmO bele koncertis por ni kaj entuziasmigis la aŭskultantaron. Krome estis Luda, Teatra, Muzika kaj Internacia Vesperoj kaj kompreneble kiel kulmino la Silvestra Festo en pluraj salonoj de unu el niaj domoj.

Okazis interalie prelegoj pri Vikipedio, Linukso kaj pri la nova eŭropa referenckadro pri lingvoj, lumbildprelegoj pri mondvojaĝo kaj pri Japanio, diskuto pri trafika politiko, kurso pri tridimensia desegnado kaj pri Salsa-danado, rondo por malstreĉiĝemuloj kaj por Jogo-ŝatantoj — kaj kompreneble lingvaj kursoj kaj konversaciaj rondoj. Ni ekskursis al pluraj najbaraj urboj kaj vilaĝoj, jen piede, jen aŭte aŭ trajne, por viziti regionan muzeon, bierfarejon, malnovan urboparton, kastelruinon kaj monakejon aŭ simple ĝui la naturon kaj arbaron. Dumtage kaj vespere funkciis la kafejo, kiun sperte gvidis Helmut Klünder kun helpo de Gunter Neue kaj Danka Leyk.

Pri la renkontiĝo aperis artikoloj en la regiona gazetararo. Krome la germana novajagentejo dpa estis tiom afabla publikigi artikolon, el kio rezultis krom kelkaj regionaj represoj ankaŭ intervjueto en la tutgermana gazeto *Süddeutsche Zeitung* aperanta en Munkeno.

**Lu Wunsch-Rolshoven**  
EsperantoLand

NR-6: infana teatraĵo (Fotis Sylvain Lelarge)



## Koridora IF en Dusseldorf

Ni nomis la 24an Internacian Festivalon (27 dec – 3 jan) *Koridora IF*, ĉar multe da tempo ni pasigis en koridoroj. En koridoro ni vicis por manĝoj, en koridoro okazis danc-kurso, polonezo, lumbilda projekciado kaj tie ankaŭ funkciis la libroservo.

Al la ĉi-jara IF aliĝis 169 partoprenantoj el 20 landoj. Ni estis pli kunpremitaj ol kutime, sed tio ne malhelpis esti feliĉaj.

La kadra temo, *Vojaĝoj*, transportis nin al diversaj lokoj de la mondo. Pere de bildoj kaj filmo ni povis sekvi transsiberian vojaĝon al la Universala Kongreso en Japanio kaj spekti ne nur la kongresan etoson, sed ankaŭ aliajn belajn lokojn en la lando de la leviĝanta suno. Dum la vojaĝo tra Skandinavio ni admiris pejzaĝojn de Norvegio, Finnlando kaj Svedio kun kelkaj aventuroj. Ne malpli interesa estis pieda promeno kun du azenoj tra pitoreskaj partoj de Francio. Admirinde bela kaj impresplena estis vojaĝo inter Tibeto kaj Kaŝmiro en la plej norda parto de Hindio. Alia prezento montris la vivon de tibetanoj kaj ankaŭ imponajn palacojn, templojn, monaĥejojn kaj belan naturon. Dum projekciado de bildoj el Kenjo kaj Tanzanio ni spektis sovaĝajn bestojn en naturparkoj de tiuj du landoj. En fora Altaĵo ni konatiĝis kun bela naturo kaj montara regiono de Siberio.

Krom pri la ĉeftemo okazis aliaj prelegoj. Internacia Vintra Universitato enhavis prelegojn pri ĉina astronomio, vivo sur Marso, instruoj el la historio de la psikiatrio kaj la dialogaj trajtoj de komunikado kaj de Esperanto.

Dum la vesperaj programeroj ĝojigis nin JoMo, duopo el la grupo *Kajto*, Mikaelo Bronŝtejn kaj Solo. Dum la jubilea 10-a dancvespero ni dancis laŭ orienta maniero kaj dum la balo laŭ ĉiuj manieroj.

Grandan sukceson kaj gajan etoson alportis la bier-seminario kun Harald Schicke, dum kiu ni gustumis 9 specojn da bieroj. En la lasta, Internacia Vespero, ni aŭdis poemon, kantojn, flut- kaj akordion-muzikon, spektis dancojn. La duan fojon prezentis sin barbuloj. Kiel honora barbulo estis akceptita la organizanto de la festivalo, nia kara HDP, al kiu oni fiksis falsan barbon. Li ĝoje akceptis.

La tuttaga ekskurso okazis dum pluva vetero kaj ni, kiel planite, vizitis Rejnvalon.

**Liba Gabalda**



## Nobelpremio: subteno el Pollando

Du polaj parlamentanoj el la urbo Bielsko-Biała rekomendis UEA por paca Nobel-premio — samideanino Margareta Handzlik, membro de la Eŭropa Parlamento kaj s-ro Rafal Muchacki, pola senatano. Ambaŭ reprezentas la nun regantan en Pollando Civitanan Platformon. Ĉiu direktis apartan rekomendoleteron.

**Barbara Pietrzak**

## Marjorie Boulton nobelkandidato

La membraro de Esperanta PEN-Centro selektis kvar kandidatojn por la literatura Nobel-premio: Marjorie Boulton, István Nemere, Giorgio Silfer, Spomenka Štimec. Inter ili la abonantaro de “Literatura Foiro” elektis unu kiel definitivan kandidaton. La abonantoj rajtis indiki ankaŭ kvinan nomon laŭplaĉe, sed neniu utiligis tiun rajton.

Entute balotis 24 abonantoj el 13 landoj en du kontinentoj. Iliaj voĉoj kreis la sekvan klasifikon: Boulton: ok; Štimec: ses; Nemere kaj Silfer: po kvin.

Laŭ la supra, la Esperanta PEN (kiu ricevis formalan invitleteron de la Sveda Akademio) proponos por 2008 la nomon de Marjorie Boulton, se ŝi konsentos.

**HeKo**

## Italio: kunlabore kun Unesko

18 dec mi, kiel prezidanto de Itala Esperanto-Federacio, kaj Ranieri Clerici, kiel estrarano de ĝi, havis interparolon kun respondeculo de la Itala Unesko-Komisiono, al kiu ni klarigis detale la labor-programon de IEF okaze de la jaro 2008. Ni petis samtempe ilian kunlaboron por manifestacio pri Lingvaj Rajtoj. Tion ili akceptis kaj siavice petis nian kunlaboron okaze de la Tago de Gepatraj Lingvoj.

Ranieri ricevis konsilojn pri la projekto pri la propedeŭtika valoro de Esperanto, kiun UEA intencas proponi al Unesko.

Mi kredas, ke valoras, ke:

— ĉiu landa asocio pensu pri sia plano por utiligi la jaron 2008 por informi pri Esperanto;

— ĉiu landa asocio provu informi la Unesko-komisionon (aŭ aliajn taŭgajn landajn instancojn) pri la ekzisto kaj laboro de la enlandaj esperantistoj.

La materialo produktita de IEF estas videbla ĉe: <http://www.esperantoitalia.it/jarodelalingvoj.htm>.

**Renato Corsetti**



## Ĵurnalistoj kongresos en Litovio

Litova Ĵurnalista Asocio kaj Litova Esperanto-Asocio 26–30 maj 2008 okazigos Tutmondan Kongreson de Esperantistoj-Ĵurnalistoj en la malnova urbo-domo de Vilnius, la ĉefurbo de Litovio.

La ĉeftemo de la kongreso estas *Internacia interkultura komunikado: ĵurnalismo kaj Esperanto*. Krom la laborprogramo okazos ankaŭ granda ekskursiva programo.

Al la kongreso estas invitataj ĉiuj nunaj kaj iamaj membroj de TEĴA (Tutmonda Esperantista Ĵurnalista Asocio), ĉiuj aliaj profesiaj kaj praktikantaj ĵurnalistoj (redaktoroj kaj redakcianoj de paperaj gazetoj, verkantoj de artikoloj, fotistoj, ilustrantoj, radioĵurnalistoj, redaktoroj kaj ĵurnalistoj de retgazetoj), homoj de apudaj profesioj iel rilataj al ĵurnalismo (literaturistoj, verkistoj, eldonistoj, tradukistoj).

La laborprogramo konsistas el prelegoj kaj diskutoj pri la ĉeftemo, kunvenoj de TEĴA, aliaj rilataj programeroj. Proponoj, konsiloj kaj sugestoj por la programo estas atendataj, ankaŭ sinproponoj por prelegi, raportoj pri la kongresaj temoj. La laborlingvo de la kongreso estas Esperanto.

Financaj kondiĉoj:

1. Aliĝkotizo ne ekzistas.
2. Loĝado en hoteloj dum la kongresa periodo estas senpaga.
3. Manĝado dum la kongresa periodo estas senpaga.
4. La organiza komitato pretas plene aŭ parte kovri la vojaĝelspezojn por tiuj personoj, kiuj sen financa helpo ne povus veni al la kongreso (ĝis 250 eŭroj por eŭropanoj kaj ĝis 500 eŭroj por ekstereŭropanoj). Unue la financon helpon ĝuos kontribuantoj al la kongresa programo. Pri ĉiu aparta kazo decidus la Organiza Komitato.

Aliĝo: Petu aliĝilon ĉe Litova E-Asocio poŝte (p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio), rete ([litova.ea@mail.lt](mailto:litova.ea@mail.lt)),

aŭ telefakse (+370-37-228616). Limdato por aliĝi estas 30 apr 2008.

Loĝado: En urbaj hoteloj (*Ecotel, Holiday Inn, Novotel* k.a.).

Manĝado: Matenmanĝo en hoteloj, aliaj manĝoj en lokoj anoncotaj poste.

Vizoj: Al Litovio senvice rajtas veni civitanoj de ĉiuj landoj de la Eŭropa Unio kaj de multaj aliaj landoj. Aliaj anticipu petu vizojn en Litoviaj ambasadejoj kaj konsulejoj en diversaj landoj. En problemaj kazoj turnu vin por helpo al Litova Esperanto-Asocio. Se necesos, organizantoj sendos oficialajn invitojn por la kongreso.

Aktualajn informojn pri la Kongreso legu en la retejo: [www.esperanto.lt](http://www.esperanto.lt).

## Araba Komisiono sub nova nomo

Por daŭrigi la araban agadon de UEA, la Estraro de UEA elektis komisionon, kiu ricevis la nomon Komisiono pri Agado en la Meza Oriento kaj Norda Afriko. Kvankam pro mallongeco oni verŝajne plu parolos ankaŭ pri araba komisiono, ĝia oficiala nomo estis revertumita conforme al la praktiko de Unuiĝintaj Nacioj.

La nordiganto de la komisiono estas Marie Helene Desert (Francio) kaj ĝia sekretario estas Renato Corsetti (Italio). Krome membras en ĝi Si Abdelkrim Boughoud (Maroko), Mohand Cherif Chelbi (Alĝerio), Samia Harir (Francio), Bachir Elmaghnia (Alĝerio), Wa'el el-Mahdi (Barejno), Gerrit Berveling (Nederlando) kaj Atilio Orellana Rojas (Nederlando).

**GK UEA**

## TEJO: denove nova prezidanto

Dum la komitatkunsido de TEJO en IS 2007/2008 en Würzburg (Germanio) nova estraro de TEJO estis elektita:

Gregor Hinker (prezidanto — *vd.* sur la dekstra foto), Anna-Laura H. Wickström (ĝenerala sekretario), Sergej Tyrin (kasisto), Rogener Pavinski, Vildana Delalić.



La nova prezidanto, Gregor Hinker, naskiĝis 20 maj 1981. Li estas studento pri maŝinĝenerado kaj muzikscienco en Vieno. Lia celo dum la oficperiodo estas: «plukrei retojn al la “ekstera mondo” kaj komuniki bildon de TEJO kia ĝi estas: internacia senlima reto de junuloj plena da kreivo kaj energio».

(Laŭ tejo.org)



## Komune seminarii sub falanta neĝo

La 26a Komuna Seminario inter Ĉina, Japana kaj Korea junularoj (KS) okazis en Iksan (Korea Respubliko) 28–30 dec kun la temo “La rolo de gejunuloj por paca kunvivado de Ĉinio, Japanio kaj Koreio”.

Sume 50 esperantistoj el kvin landoj (Ĉinio, Japanio, Malajzio, Ganao, Koreio) partoprenis en KS. Ni havis viglan diskuton kaj agrablan tempon per multaj programeroj. Okazis ne nur akademijaj kaj Esperanto-movadaj prelegoj, diskuto kaj kunsido, sed ankaŭ danco-kurso, ekskurso, bankedo, aŭkcio, koncerto kaj vizito al Ŭonbulisma centro.

Partopreno de antaŭaj KS-anoj kaj aktiveco de partoprenantoj briligis nian renkontiĝon. Kaj oni opinias, ke ĉi-foja KS estis skale malgranda, sed etose tre sukcesa.

Traktinte la ĉeftemon, partoprenantoj adoptis jenan rezolucion.

1. Ni konsideru la ne-formalan strukturon de nuna Komuna Seminario, kaj ankaŭ konsideru junulojn en kromaj landoj, kiuj esprimas intereson pri KS. Estas necese ekpensi pri la sfero de nuna Komuna Seminario kaj plioficialigi la strukturon.

2. Sur la fundamento de la diskuto, kiun partoprenantoj dividis dum la tempo diskuti, ni daŭre kunsidos por okazigi pli vast-sferan eventon, ekzemple “Azia Junulara Kongreso (AJK)”, partoprenata de junuloj el ĉiuj aziaj landoj.

3. Por sisteme plenumi la taskon, estas necese plu diskuti kaj kunsidi pri establo de nova organizo, ekzemple “Azia Esperantista Junulara Organizo” (AEJO), kiu ĉefe respondecos organizi kaj okazigi sian eventon.

4. Por glata kaj pli efika komunikado, estas necese krei interretan TTT-paĝon nome de nia nova organizo, por ke niaj estraranoj bone respondecu pri la administrado.

5. Por vigligi junularan movadon, estas utile havi propran kanton kaj alian kulturaĵon de niaj organizo kaj evento. La volontula komponisto el aziaj junuloj povus krei la kanton kun konsento de niaj membroj. Ni akceptos opiniojn pri teksto de la kanto, kaj elektos la plej bonan per oftaj kontakto kaj kunsido.

**Song Ho-young**

**Sur la paĝosupra foto ne ĉiuj partoprenantoj troviĝas, ĉar iuj el ili forlasis la seminariejon antaŭ la fotiĝo. Dum la seminario bele neĝis en la urbo Iksan, kvazaŭ Dio benis azian junularan movadon.**

## Esperantujo togolanda ĉiam aktiva Ĵurnalista premio

Dum la lasta semajno de 2007 Esperanto ofte aŭdiĝis en Togolando. La feston en Instituto Zamenhof sekvis la 15a Togolanda Esperanto-Kongreso, kaj la jaro fermiĝis per spontana kolektiĝo de esperantistoj en Instituto Zamenhof.

La plej grava inter ĉi tiuj aranĝoj la 15a TEK, kiu okazis 28–30 dec en Aneho. Ĝin partoprenis du francaj kaj sepdeko da togolandaj esperantistoj.

Nenio novas en la programeroj: inaŭguro, prelego pri la kongresa temo kaj diskutorondo, kurso por komencantoj, futbalmatĉo, kvizo, komitatkunsidoj, ekzamenoj, fermo, ktp.

El la komitatkunsidoj oni notis, ke la Togolanda movado pli kaj pli memstariga. Plia afero koncernas aperon de esperantistoj “produktitaj” de Instituto Zamenhof aŭ/kaj de aliaj esperantistoj — tio garantias la estontecon certan de la movado en Togolando.

La kongresa temo “Esperanto en la ĉiutaga vivo” naskis la rezolucion de la kongreso. Tiu ĉi rezolucio postulas de Togolandaj esperantistoj honestecon, sindonemon, bonvolemon, efikan kunlaboron kun ĉiuj, regadon de la lingvo, kaj emfazas la perEsperantan agadon. Palpebla ekzemplo estas verkado de afrikanoj kaj la rolo de Afrika Centro Esperantista en la eldonado de tiaj libroj — kelkaj verkoj eldonitaj de ACE aperis sur la ekspozicia tablo.

Organizi kongreson fariĝas ĉiujaraĵo en Togolando, kies movado ofertas buntajn facetojn Esperantujajn. La 16a TEK okazos 26–28 dec 2008 en la loko, kiun decidis la komitato en marto.

**Gbglo Koffi**

Germana Esperanto-Asocio estas unu el organizoj, kiuj ricevis entute 10 mil eŭrojn de donacoj. La 20 gajnintoj de la “Germana Ĵurnalista Premio pri borso, financoj, ekonomio” kune kun la 200 gastoj de la festa premiodona ceremonio elektis tiujn organizaĵojn.

GEA per tio staras en sama rango kun konataj komun-utilaj organizoj kiel la Germana Kancero-Asisto, Greenpeace aŭ Plan International, kiuj estis speciale honorataj per tiu subteno en 2007.

Ĉiu premiito ricevas, krom persona monpremio, la rajton nomi komun-utilan organizon, kiu estas subtenata de unu el la sponsoroj.

Al GEA la premiito Frank Stocker, eksprezidanto de GEA, atribuis 500 eŭrojn.

**Thomas Sandner**

## Inter 20 plej gravaj projektoj

Esperanto estis elstare menciita en la prestiĝa germana semajna gazeto *Die Zeit*. Ĝia jarfina resuma ĉefartikolo *Spiel ohne Grenzen* (Ludo sen limoj) komparas dudek plej grandajn internaciajn projektojn, kiuj celas solvi enigmojn de la naturo aŭ utili al la homaro en kvin kampoj: fiziko, kulturo, biologio, spaco kaj medio. Kiel unu el la kvar plej gravaj internaciaj projektoj en la kampo “kulturo” oni elektis Esperanton, kun bildo de Zamenhof:

<http://www.zeit.de/online/2008/02/bg-weltraetsel?6>

Necesas tamen atentigi pri kelkaj gravaj misinformoj kaj eraraj prijuĝoj, kion mi faris per letero al la redakcio.

**Amri Wandel**



## Tre sukcesa la dua AfrES

“La Esperanta Civito portas al Afriko la esperantan kulturon: nun estas nia vico, afrikumi tiun kulturon”, — tiel komentis unu el la dek ok personoj el Burundio, Kongolando kaj Ruando, kiuj partoprenis en la dua Afrika Esperantologia Semajno.

La dua AfrES, organizita de Kultura Centro Esperantista kaj Esperanto sekcio de SIPU (Societo Internacia por la Paco Universala), ambaŭ aliĝintaj al la Pakto por la Esperanta Civito, disvolviĝis en privata kampuso de Buĵumburo (ĉefurbo de Burundio) 3–7 jan 2008, sub la gvido de c-ano Giorgio Silfer.

“Dum sep horoj tage, sed foje iom pli, tute sen laciĝo ni okupiĝis pri (inter)lingvistiko, esperanta literaturo, historio de Esperantio, tekniko de komunikado. La formado okazis tra lecionoj, diskutoj, ekzercoj, spektado de filmoj kaj aŭskultado de kasedoj kaj diskoj”, — diras alia partopreninto, aparte impresita de la voĉoj de kelkaj eminentaj esperantistoj, interalie tiu de William Auld en *La infana raso*.

Laŭ Silfer, en la dua AfrES nur du-tri partoprenantoj estis jam C-nivelaj, do malpli ol en la unua AfrES (Lomeo, jarfine 2005); “tamen tre altaj estis ĉies interesiĝo, diligento kaj kapablo asimili novaĵojn”, — li rimarkas.

8 jan okazis la inaŭguro de la sidejo de Afrika Esperanto-Instituto: tri lernoĉambroj kaj unu kontoro. La burundia televido intervjuis la Konsulon de la Esperanta Civito, kaj raportis pri la progresoj de nia lingvo, danke al SIPU.

Eĉ pli da atento ricevis la renkonto inter la Konsulo kaj la Prezidento de Burundio, Pierre Nkurunziza, la postan tagon. La Konsulon akompanis la prezidanto de SIPU, c-ano Frederiko Nimubuna, kaj la direktoro de Afrika Esperanto-Instituto, c-ano Marteno Mbazumutima.

La interparolo koncernis precipe la projekton “Ama Horo” (en la runda “amahoro” signifas pacon), aŭ Cité de la Paix — Civito de la Paco, kiun SIPU intencas realigi en provinco apuda al la Tanganika Lago, eble en la ĉefurbo mem, Buĵumburo. La Prezidento de Burundio promesis sian apogon por trovi la terenon, eĉ se temus pri alia.


La televido intervjuis la Konsulon tuj post la renkonto kun la Prezidento: la intervjuo estis elsendita plurfoje la postan tagon, kun komentario kaj/aŭ traduko en kvar lingvoj: franca, runda, svahila kaj angla.

**HeKo**

## Grava libro eldonita

En decembro finpretiĝis la Esperanta traduko de grava lingvopedagogia verko de la Konsilio de Eŭropo. Per ĝi Esperanto atingis lingvopolitikan rekonon ĉe eŭropaj instancoj kiel la Konsilio de Eŭropo, ALTE (Asocio de Lingvo-Testistoj en Eŭropo) kaj la DIALANG-projekto de la Eŭropa Komisiono, kiuj bonvenigis kaj aprobis la aperigon de siaj dokumentoj en Esperanto.

La resuma verko *Komuna Eŭropa Referenckadro por lingvoj: lernado, instruado, pritaksado* celas en travidebla kaj kohera maniero subteni lingvolernantojn, lingvouzantojn kaj instruistojn ĉe la difinado kaj atingado de siaj celoj. La ellaboritaj taksosistemoj ebligas unuecan mezuradon de lingvaj kapabloj, kun travideblo kaj internacieco, kiu faciligos kompari lingvokonon en diversaj landoj kaj por tio servas kiel bazo de la ekzaminsistemo de UEA-ILEI.



La Referenckadro-projekto disvolviĝis sub la gvido de la porinstruista retejo [www.edukado.net](http://www.edukado.net). La diplomatan kaj organizan laboron plenumis Katalin Kováts, kiun helpis en diversaj fazoj de la laboro Sylvain Lelarge, Renato Corsetti kaj Osmo Buller.

Roel Haveman dum monatoj per persista kaj diligenta laboro esperantigis la dokumenton. La traduklaboron financis Esperantic Studies Foundation (ESF), kaj Fondaĵo Saliko subtenis eldonajn kaj organizajn kostojn.

La libro estas elŝutebla el la retejo [www.edukado.net](http://www.edukado.net) kaj multobligebla por nekomercaj celoj. Ĉe la libroservo de UEA akireblos fine de januaro kontraŭ produktokostoj multobligitaj ekzemploj, kiuj povas bone servi kiel informmaterialo donacota al bibliotekoj kaj landaj edukinstancoj.

**Katalin Kováts**

## Kopenhaga jubileo

6 jan Kopenhaga Esperanto Klubo (KEK) festis sian 100-jaran jubileon. Antaŭtagmeze oni vizitis la tombon de Marie Schröder, unu el la fondintoj de la Klubo antaŭ 100 jaroj. Ĉe la tombo la prezidanto de KEK, Betty Catterjee, estis intervjuita de la loka televido.

Posttagmeze okazis la jubilea festeno en la salono de la Kulturdomo *Nordvest*, kie KEK havas sian kunvenejon. Post la lunĉo sekvis koncerto de la dana koruso TAP, kiu kantis danajn kantojn esperantigitajn kaj kune kun la ĉeestantaro finis la programon kunkantante la danan, eŭropan kaj Esperantan himnojn. La programon daŭrigis Mikaelo Bronštejn, kiu kantis ne nur pri sia devenlando, sed ankaŭ pri pluraj aliaj temoj.

Okaze de la jubileo du gravaj danaj gazetoj skribis artikolojn pri Esperanto, la loka televido faris 30 minutan programon pri la tago, kaj la unua programo de la dana radio invitis la prezidantaron de DEA, Ileana Schröder, kiel ĉefgaston en 50-minuta elsendo pri Esperanto. Pluraj personoj post la elsendo esprimis deziron lerni Esperanton!

**Ileana Schröder**

## Esperanto kiel terapio

En novembro 2007 en la urbo Volta Redonda (ŝtato Rio-de-Ĵaneiro, Brazilo) dek personoj finis bazan kurson de Esperanto, gvidatan de universitata eksprofesoro Alberto Flores.

La kurso okazis ĉe Centro de Komunumaj Aferoj *Roque Garcia Duarte*, kiu estas parto de AAP-VR (Asocio de emeritoj kaj pensiuloj de Volta Redonda) kun 45 mil membroj. Tie oni konsideras, ke lernado de Esperanto estas valora okupa terapio, kiu helpas krei memestimon, stimulas memoron, pligrandigas memfidon kaj ebligas amikecon kaj fratecon inter la gelernantoj de ĉiuj aĝoj.

La kurso daŭris ok monatojn kun matenaj lecionoj ĉiumerkrede. La lernoĉambro estis tre komforta, kun bona lumigado kaj ventolado, provizita per blanka tabulo. Oni uzis ankaŭ vidbendojn. La kurso estis senpaga, sed la lernantoj devis aĉeti libron de apogo. Dum mallongaj paŭzoj inter la lecionoj AAP-VR ofertis kafon, mineralan akvon kaj biskvitojn.

AAP-VR disdonis belajn atestojn al la gelernantoj, kiuj estis tre feliĉaj, ĉar Esperanto malfermis al ili kontakton kun aliaj esperantistoj, pere de reto kaj leteroj. Nova kurso okazos en 2008.

**Alberto Flores**

## Unufraze

★ Ankaŭ ĉi-Kristnaske papo Benedikto XVI diris siajn bondezirojn en 64 lingvoj, inkluzive de “Dibenitan Kristnaskon kaj prosperan novjaron!” en Eo; grupo da esperantistoj ĉeestis en placo Sankta Petro kun paneloj kiuj konsistigis la vorton “Esperanto”. ([www.ikue.org](http://www.ikue.org))

★ Federacia prezidanto de Germanio distingis renomnan e-iston Rokuro Makabe per merit-ordeno *Verdienstkreuz am Bande des Verdienstordens der Bundesrepublik Deutschland*. (R.M.)

★ En la brazila parlamento okazis oficiala raporto pri multlingveco en Brazilo, kie oni parolas nun ĉ. 200 lingvojn, el kiuj ĉ. 180 estas indianaj; Emerson Werneck, Paulo Nascentes k Carlos Maria publike informis pri Eo k disdonis flugfoliojn. (BEL informas)

★ Argentina E-Lernejo, kreita de la Argentina E-Ligo, estas oficiale aprobata de la Ŝtataj Juraj instancoj per rezolucio IGJ №1067/2007; la lernejo rajtas ricevi subvenciojn k enkonduki instruadon de Eo. (AEL)

★ En novembro asocio *Esperanto Vendée* en La Roche-sur-Yon (Francio) reprezentigis en la Forumo de Studentaj Solidarecoj en la Supera Instituto de Teknologio k aranĝis du E-ekspoziciojn en la banko *Crédit Agricole*. (*La Sago*)

★ E-stando *Esperantoland* estis aranĝita en Berlino dum la tradicia tritaga foiro *Expolingua*. (*Esperanto*)

★ Aktiva E-propagandisto en Indonezio, Hazairin R. Junep, ricevis oficialan licencon de E-ĉiĉerono. (Hori Jasuo)

★ 15 nov 2007 delegacio de Esperantic Studies Foundation donacis 26 librojn de Ŝekspiro en Eo al la Ŝekspira Biblioteko Folger (Vaŝingtono), la plej grava biblioteko en la mondo pri Ŝekspiro. (*Informilo por Interlingvistoj*)

★ Fine de 2007 la memortabulo pri Andreo Ches estas denove pendigita en Sibiu (Rumanio) kun teksto en la rumana, germana k Eo. (Aurora Bute)

★ Je 18 jan al la 93a UK (19–26 jul, Roterdamo) aliĝis 923 personoj el 53 landoj, plej multe el Francio — 119; sekvas Nederlando 119, Germanio 93, Japanio 76, Belgio 60, Italio 41, Pollando 34, Danlando k Finnlando po 27, Irano 23. ([uea.org](http://uea.org))

★ En Ĉelinac, urbeto apud Banja Luka (Bosnio-Hercegovino), unufoje en historio komenciĝis E-kurso, organizita de E-societo *La mondo* (Banja Luka) k mezlernejo de Ĉelinac; instruas Mico Vrhovac. (Landa Agado)



Anna Gwizdon kaj Roberto Kolodziej en majo 2007 estis inter la unuaj ricevintoj de la nova Esperanto-atesto en la Jagelona Universitato. (*Fotis Kinga Dubiel*)

## Supera kurso en Krakovo

Esperanto-kurso en Jagelona Universitato en Krakovo estas unufoje disponigita al aliurbaj kaj alilandaj partoprenantoj, kiuj lernas perrete. Ĉiusemestre okazas tritaga ĉeesta (fakultativa por nelokaj studentoj) studsesio. La lernado daŭros ĝis la fino de majo 2008. La kurso havas praktikajn celojn: korektan, plilarĝigan kaj plibeligan (pri tiu lasta celo, la devizo estas: “Se vi parolas Esperante, parolu bele”).

Oni lernas ne nur per bonaj tekstoj, frazmodeloj aŭ sonmaterialoj, sed oni rapide progresas ankaŭ danke al arto: specialaj kantoj, dancoj k.a. La kursanoj, kiuj ne povas ĉeesti la sesiojn, akiras praktikajn kapablojn, trejnitaĵojn dum la kurso, laborante rete (voĉe), indvidue, kun la kursgvidantino.

La kurson konceptis, aŭtoras kaj gvidas Maria Majerczak, universitata fakulino pri metodiko de instruado de fremdaj lingvoj. Verŝajne unufoje en tiu universitato estas realigata lingvoinstrua programo, internacia kaj diversrimeda. La kurson partoprenas, interalie, spertaj esperantistoj. Ili esprimas sian intereson kaj kontenton pri la partopreno. Post la kurso la studentoj ricevos ateston de la universitato.

La unua sesio, kun riĉa materialo kaj variaj, ankaŭ novinventitaj metodoj, okazis 21–23 dec (pri ĝi bonvolu legi pli en la ĉi-sube menciita retpaĝaro).

La kurso estas koresponda, do deziranto povas ankoraŭ aliĝi al ĝi.

Pli: <http://www.esperanto-reto.org>

**Małgorzata Komarnicka**

## Jubilea ekspozicio

Danke al penoj de kelkaj gesamideanoj, en Radom (Pollando) oni lanĉis grandan Esperanto-ekspozicion, dediĉe al centjara jubileo de la organizita Esperanto-movado en la urbo.

La ekspozicion oni malfermis en granda salono de “Civitana Klubejo” en ĉesto de pli ol 60 gastoj kaj esperantistoj. Lokaj amaskomunikiloj raportis pri tiu ĉi evento. Anonima amikino de Esperanto regalis ĉiujn per bongustaj kukajaĵoj. La ekspozicio funkcios ĝis la fino de januaro 2008.

**Antoni Dorosz**

## Ĉiam freŝa FREŜO

Post kelkjara paŭzo revenas fama esperantista renkontiĝo FREŜO — Fruŝomera Renkontiĝo Esperanta Ŝokanta Olŝtinanojn. Ĝi okazos 26 jun — 2 jul en Olŝtino (Olsztyn, Pollando). La ĉefa temo estos: “Gajnu monpremion en Olŝtino kaj ripozu ie en Esperantujo”. Krom la tradicia kvizo estas planataj: brulŝtiparo kun biero kaj kolbasetoj, artaj prezentadoj, ekskursoj al ĉarmaj lokoj (ĉirkaŭ Olŝtino estas 17 lagoj); prelegoj kaj kelkaj surprizoj.

Loĝloko en la internulejo de la VartistinStudumo havas nur avantaĝojn. Ĝi situas apud Urba Malsanulejo kaj antaŭ Funebra Domo.

Pliajn informojn petu rete ĉe Marian Zdankowski ([avolamer@ols.vectranet.pl](mailto:avolamer@ols.vectranet.pl)) kaj Elżbieta Frenszkowska ([efrenszkowska@wp.pl](mailto:efrenszkowska@wp.pl)).

Trafoliumu retrevuon *FREŜO*, kiun oni povas elŝuti el: <http://forum.esperanto.org.pl/viewforum.php?f=10>

**Marian Zdankowski**

## Du fotoekspozicioj

Fervojista E-societo en Niŝ kaj la Asocio de fotoamatoroj *Suva Planina* (ĉiuj membroj de Montgrimpa klubo “Suva Planina”) kunorganizas internacian foto-ekspozicion *Vilaĝoj kiuj malaperas — la lingvo kiu kunigas*. Aperigota katalogo enhavos ankaŭ tradukon en Esperanto. La alvoko validas por ĉiuj, ne nur por esperantistoj. La limdato por aliĝi: 4 apr 2008.

*Suva Planina* ankoraŭ unu fotoekspozicion okazigos fine de majo. La temoj estas: *Montgrimado* kaj *La monto Rila — arkitekturo de la naturo*, la limdato por sendi fotojn: 30 apr 2008.

La informilojn kaj aliĝilojn petu rete: [nebo-d@eunet.yu](mailto:nebo-d@eunet.yu)

**Nebojša Espero Stankoviĉ**



## Alvoko el Bjalistoko

La urbo Bjalistoko akceptis decidon proprakoste renovigi la historian konstruaĵon ĉe la strato Warszawska 15 kaj destini ĝin por la sidejo de la Esperanto-Centro *Ludoviko Zamenhof*. Laŭ la plano la objekto devas esti preta kaj ekipita ĝis 25 jul 2009.

La Esperanto-Centro konsistas el tri fakoj:

1. Zamenhof-Muzeo
2. Eduka kaj Kultura Centro
3. Centro pri Esploroj de Kultura kaj Lingva Komunikado.

Por Zamenhof-Muzeo ni serĉas memoraĵojn rekte aŭ nerekte ligitajn kun d-ro Ludoviko Zamenhof kaj Esperanto. La memorajojn-eksponaĵojn eblas transdoni senpage aŭ pruntedoni por difinita periodo. Ĉiujn ricevitaĵojn eblos rigardi antaŭ la malfermo de la unua muzea ekspozicio en la retpaĝo de la Esperanto-Centro kune kun informo pri ilia deveno. Sekve ili fariĝos elementoj de la virtuala Zamenhof-Muzeo — galerio *Memoraĵoj proksimaj al la koro*. Ni konscias, ke pro teknikaj kialoj ne ĉiuj eksponaĵoj povos troviĝi en la konstruaĵo ĉe la strato Warszawska 15.

Kiel la unuaj, sian kontribuojn por la kreota Zamenhof-Muzeo anoncis Barbara Pietrzak, la Ĝenerala Sekretario de UEA kaj Osmo Buller, la Ĝenerala Direktoro de UEA.

Ni alvokas posedantojn de ĉi-specaj memorajoj, pretajn disponigi ilin al la Centro, kontaktiĝi kun la Bjalistoka Esperanto-Societo, por ke la grupo laboranta pri la unua ekspozicio povu prilabori ilin kaj la gastoj de la 94-a Universala Kongreso de Esperanto en Bjalistoko ilin admiru.

Kontaktadreso: [esperanto.bialystok@interia.pl](mailto:esperanto.bialystok@interia.pl)

Antaŭdankante

**Ela Karczewska**  
Prezidantino de BES

## Nombroj sen komentoj

### Kiaj estas ukrainianoj?

Ukrainia informagentejo *LigaBiznesInform* sciigis, ke, laŭ pasint-jaraj opiniondoj, nombro de ukrainiaj civitanoj, kiuj konsideras sin eŭropanoj en 2007 estis 11,9% (14,5% en 2006). En la okcidenta Ukrainio estas 22,5% da “eŭropanoj” (23,3% en 2006), en la centra — 11,3% (15,7%), en la suda — 11,1 (14,0%) kaj en la orienta — 6,8% (8,5%).

Se temas pri lingvoj en Ukrainio, 51,4% da respondintoj deklaris, ke ilia hejma lingvo estas la ukraina (52% en 2006), 25,7% (30,7%) nomis la rusan, kaj por 21,5% (15,6%) hejmaj estas ambaŭ lingvoj.

### Gasto sen avizo — malbona surprizo

Sekretario de la Moskva migroservo Zalina Filimonova informis, ke en 2007 la migroservo registris en la ruslanda ĉefurbo ĉ. 1,7 mln da daŭre loĝantaj civitanoj de aliaj landoj. Inter ili nur 648 mil 517 personoj havas laborpermeson. Ne estas certe sciata, kion faras pli ol miliono da tiuj sen laborpermeso.

Dum 2007 en Moskvo estis faritaj pli ol 25 mil kontroloj, rezulte de kiuj ĉ. 260 mil eksterlandanoj, kiuj ne havas laborpermeson aŭ restadpermeson, ricevis monpunon.

Pasint-jare 7 mil 559 tiaj “gastoj”, loĝintaj en Moskvo, estis ekstradiciitaj pro gravaj rompoj de la enmigraj leĝoj de Ruslando.

## Esperantisto arestita pro seks-atenco

Konata belga esperantisto en decembro estis arestita, post kiam lia nun 23-jara lernantino formulis akuzojn, laŭ kiuj ŝi meze de la 1990aj jaroj estis ripete sekse atencita de li. La lernantino mem nun suferas de serioza psika malordo, kaj estas kuracata en kliniko, kie ne estas permesitaj vizitoj. Ankaŭ ŝi havas proksiman kontakton kun la Esperanto-movado.

La kuracistoj de la lernantino konsideris la akuzojn kredindaj, kaj transdonis la aferon al la polico, kiu post konsultigo faris la saman prijuĝon, kaj 17 dec 2007 arestis la akuzaton. Poste la aresto estis longigita de konsilia komisiono.

La esperantisto, kiu estas jam pli ol 70-jara, mem deklaras sin komplete senkulpa, kaj tial kun apogo de sia advokato apelaciis al sendependa komisiono, por ke li estu senprokraste liberigita. La skriba deklaro de la lernantino, sur kiu sin apogas la akuzo, laŭ la advokato enhavas plurajn evidentajn malveraĵojn, kio povas malpliigi la kredindecon de la akuzo.

3 jan 2008 la apelacia komisiono tamen decidis ne liberigi la akuzaton, sed longigis la arestotempon je unu monato. Intertempe daŭras la polic-esplorado. En lokaj gazetoj kaj televido en Belgio oni informis pri la akuzo kaj alvokis eventualajn aliajn viktimojn anonci sin ĉe la polico. Laŭ informo en belgiaj amaskomunikiloj, la akuzato “jam antaŭe havis kontakton kun la justico lige al similaj aferoj”.

La akuzato mem asertas, ke li “en la pasintaj 40 jaroj neniam faris ion pri kio [li] devus honti”, kaj ke li eĉ ne havis la teorion eblecon ripete sekse atenci la knabinon, ĉar la lecionojn, dum kiuj tio devis okazi, li donis en la hejmo de la knabino, kaj la gepatroj ĉeestis en apudaj ĉambroj.

(Laŭ *Libera Folio*)

## Leterkesto

Ĵus poŝtisto ĵetis leterojn kaj periodaĵojn sur la plankon de nia antaŭĉambro. La januara numero 2008 de mia ŝatata *Ondo* alvenis. Ĝi estis kvazaŭ vitaminpilolo, ĉar tuj mi sukcesis pagi la abonkotizon de *Ondo* al via peranto en Finnlando. Kun aparta intereso mi tuj komencis legi la artikolon “Iĝi veraj ambasadoroj de bona volo”. Temas pri intervjuo de pola ĝenerala konsulo Jarosław Czubiński en Kaliningrado. Vere kortuŝa estas la sinteno de estimata pola diplomato, kiun mi kore salutas kaj bondeziras por la nova jaro 2008. Tiajn homojn nia mondo bezonas. Li estas admirinda kaj sukcesa konstruanto de hela estonteco por ĉiuj homoj sur nia tergloblo.

**Jorma Ahomäki** (Finnlando)

Mia versaĵo, ricevinta la laŭdan mencion en la ĉi-jara *Liro*, nomiĝas ja *Simplarimaĵo* (sen la spaco). La prezento en la nuna formo ja komplete ŝanĝas la sencon: ĝi ne estas rimaĵo, kiu estas simpla, sed ĝi estas aĵo, karakterizata de simplaj *rimoj*.

**Paŭlo Moĵajev** (Ukrainio)

En la artikolo *Peterburga panoramo* (LOdE, 2007, №11, pĝ. 14) mi eraris — la gvidanto de SPIRO estas Miĥail Kolodin kaj la gvidanto de *Amikaro* estas Anna Fomina.

**Anatolo Sidorov** (Ruslando)

Bonvolu forstreki “Brazylia” de mia adreso. Mi vivas en la urbo Belo Horizonte, kaj Brazylia (portugale Brasília) estas alia urbo. Brazylia (Brasília) estas la ĉefurbo de Brazilo, kaj estas en alia regiono de mia lando.

**Joaquim Cabral Netto** (Brazilo)

Ni dissendas la revuon el Pollando kaj devas ĉiun landnomon skribi (ankaŭ) en la pola lingvo, por ke polaj poŝt oficistoj sciuj kien ekspedi la pakaĵojn; Brazylia estas Brazilo en la pola lingvo.

**LOdE**

## Kongreso devige krokodila

En la januara numero de *La Ondo*, paĝo 6, aperas detala raporto pri la 7a Ĉina Kongreso de Esperanto en Kantono.

Mi eksciis, ke dum la Kongreso oni ne povis aŭdi eĉ unu paroladeton en Esperanto. Absolute ĉio okazis en la ĉina lingvo. Kelkaj eksterlandaj kongresanoj kolere forlasis la kongresejon, kaj iliaj protestoj por ke oni uzu la internacian lingvon estis plene neglektitaj de la organizantoj: oni klarigis ke la kongreso devis esti plene ĉinlingva, ĉar se oni uzus Esperanton la ĉeestantoj ne komprenus!

Ĉar en Ĉinio ia ajn protesto estas danĝeriga, oni devis silente akcepti tiun absurdan situacion.

Do, jen unika kazo de deviga krokodilado!

**Dario Rodriguez** (Hispanio)

Kongresa modrevuo (espero.com.cn)



## Ĝena afero ne por ekstero

Jam 24 dec 2007 mi ricevis la januaran numeron de *Ondo*. Mi ekĝojis planante dum la festaj tagoj legi E-novaĵojn.

Nu, mia ĝojo finiĝis, kiam mi aliris la 12an paĝon kun la skandala artikolo de Zbigniew Galor. Similajn paskvilajn fuŝaĵojn oni renkontas en landa gazetaro. Sed tio estas polaj, internaj aferoj tiel ĝenaj, ke absolute nekonvenaj por ekstera publikado. Sufiĉe kalumnias polojn kaj Pollandon judoj, germanoj kaj aliaj — precipe okcidentanoj.

Zbigniew Galor — cetera simpatia samideano — iĝis mal-simpatia ideologia antagonisto, kiu krom partia kontraŭbatalo malhonoras la naciajn heroojn kaj misfamigas gravajn, imit-indajn idealojn. Polaj legantoj eksentos tiun aĉaĵon, kiel kontraŭnacian rankoron. Eksterlandaj legantoj de tiu kalumnia komentario pritaksos, kiom valoras homo konscie prikraĉanta sian landon kaj sian nacion.

Ĉu vi vere ne havis iun pli interesan, pli internacian materialon por publikigi? Mi pensas, ke via “komplezo” misfamigi Pollandon kuŝiĝos ombre super *Ondo*. Tio estis tute senbezona redakta stumblo.

**Marian Łaba** (Pollando)

26 dec 2007 en Córdoba forpasis

**d-ro Antonio Marcelo Casartelli (1930–2007)**

argentina kuracisto, UEA-komitatano kaj aŭtoro de konata rekurso de Esperanto.

6 jan 2008 forpasis ĉina aktivulo

**Dong Shulin (1970–2008)**

esperantisto ekde 1991, li estis gastiganto de *Pasporta Servo* en Zaozhuang (Ĉinio), B-komitatano de TEJO (1998–2000) kaj vic-prezidanto de Junulara Komitato de Zaozhang-a E-Asocio.

10 jan 2008 estante 99-jara forpasis

**Takasugi Ichiro (1908–2008)**

veranome Ogawa Goroo, honora komitatano de la 92a UK. Li tradukis verkojn de Vasilij Eroŝenko en la japanan lingvon.

*Ni funebras kaj kondolencas.*

## Saĝa kaj utila reldono

Por ke recenzo ne estu demenco, ne sufiĉas nomi ĝin tia. Jen, kion mi pensis legante la elverŝon de *Ĝelazny* en *La Ondo* 12/2007. Li mem diras, ke “estas stulte recenzi” verkon klasikan kies enhavon oni povas taksu ĝenerale konata. Pri tio mi tamen dubas: de la lasta eldono (1977) pasis jam 30 jaroj kaj kio konatis al la esperantistoj inter 1920 kaj 1977, ne nepre konatas nun-tempe. Pro tio estis saĝe kaj utile reldoni la verkon kaj prezenti ĝin kun tiu minimumo de komentoj kiun Lins liveris.

Sed ĝuste al Lins *Ĝelazny* faras absurdajn riproĉojn:

1. Li lasas la spuradon de “tajperaroj” al aliaj, kvankam li scias, ke mankas koboldoj.

2. *Ĝelazny* volas substitui al Lins historian eraron mem kulpante novan: en 1918 Pollando ne liberiĝis de “prusa imperio”, ĉar Prusujo tiam ne plu ekzistis. Lins parolas pri “rusa superrego”, fakto kiun konfirmas ajna mapo de la tiama Eŭropo.

3. *Ĝelazny* parolas pri “liturgiaj vortoj omaĝe al UEA”. La sobro de la lins-a lingvaĵo apenaŭ supereblas kontraste al la emocio sur la flanko de *Ĝelazny* kun ties eksklamacioj “stulte”, “diabile”, “fuŝo”, “oni ne ŝajnu” ktp.

Almenaŭ *Ĝelazny* koncedas, ke “la libro bele aspektas”, ke “la notoj estas zorge faritaj”. Efektive, la editoro (aŭ la eldonisto) reaperigis (pĝ. 12) historian foton de Zamenhof ne trov-blan en la kolektoj de Holzhaus kaj Thien: ĝi aperis en 1909 en la tiama UEA-revuo kaj montras la paron Zamenhof ĉe sia reveno el Barcelono en la ĝeneva staci-domo en la rondo de svisaj esperantistoj.

Mia sola kritiketo: en sian bibliografion Lins ial ne enmetis la dokumentojn de Halina Edelbaum pri la studentaj jaroj de Zamenhof (Tokio 1977) nek mencias la sam-temajn studojn de Nekrasov en *La Nova Epoko*. Krom tio, la nuna eldono ne estas la sesa, sed la oka (1920, 1923, 1937, 1946, 1957, 1967, 1977, 2007).

La anoncitan konkurson (necesas preni lecionojn pri ironio) la ekskonsulo prefere proponu al sia Civito.

**Reinhard Hauptenthal**

## Kiu nun uzas latinan Biblion?

Sergio Pokrovskij en sia artikolo *La ĵusa biblio (LOdE, 2008, №1)* laŭŝajne ne estas bone informita pri la nuna stato de la latina lingvo.

Kvankam, jes, post la Dua Vatikana Koncilio, la uzo de la latina ene de la Romkatolika Eklezio multe malplilarĝiĝis; sed tamen ĝia skriba kaj parola uzo ekstere de la Eklezio multe plilarĝiĝis. Tiu uzo evidentiĝas tutlatine en la frekventa komunikado inter individuoj (inkluzive la interreta Grex Latine Loquentium), la diversaj libroj kaj revuoj (ekz. *Melissa* kaj *Vox latina*), pluraj ĉiujaraj kunvenoj en Eŭropo kaj Usono kaj alimaniere.

Krome, Sergio preterlasas, ke la nova Papo Benedikto mem uzadas, kaj rekomendas, ke la Eklezio uzadu la latinan (vidu ekz. apostolan leteron *Summorum Pontificum*).

“Kiu nun uzas latinan Biblion?” demandas Sergio — mi kaj multaj aliuloj, kiel legaĵon, kiel referencon, kiel literaturon, k.t.p. kaj kelkaj kiel religian libron.

Mi do hazarde decidis kompari la versiklojn citatajn en la artikolo el Ijob kun la samaj en la *Biblia vulgata*, kaj apartiĝinte miajn lingvajn preferencojn, surpriziĝis pri la plibela poezieco en ritmo kaj klareco de la latina versio.

**Brennus Legranus** (Britio)



## Lingvoscio en Ruslando

Preskaŭ duono da ruslandanoj scipovas almenaŭ unu fremdan lingvon. Tamen por multaj la lingvoscio signifas nur tion, ke ili scipovas legi tekstojn en fremda lingvo kun helpo de vortaro. La nombro de tiuj, kiuj scipovas paroli iun fremdan lingvon estas multe malpli granda. Paroli iun fremdan lingvon scipovas nur 16% el ruslandanoj kaj el ili duono (7,9%) havas la rusan kiel fremdan lingvon. Iun alian fremdan lingvon parolas nur 8% el ruslandanoj.

Ruslandanoj parolas fremdajn lingvojn malpli ofte ol ĝenerale en Eŭropo. En Ŝtatoj-Membroj de EU iun fremdan lingvon scipovas paroli meznombre 56% da loĝantoj. La lingvoscio estas plej malalta en Irlando kaj Britio, sed eĉ en ili minimume triono scipovas paroli almenaŭ unu fremdan lingvon.

Jenaj informoj venas el granda sociologia enketo, kiun realigis Instituto de Sociologio de la Ruslanda Akademio de Sciencoj. La enketon mendis grupo da finnlandaj sociosciencistoj. Inter la demandoj estis ankaŭ demando pri lingvoscioj. La enketo inkluzivis 2014 respondintojn en 52 diversaj lokoj de Ruslando, de Moskvo ĝis vilaĝoj en februaro-marto 2007. La sampla reprezentas la loĝantaron de Ruslando. La lingvoscio estas demandita per kvarnivela skalo: povas legi helpe de vortaro, povas legi facile, povas paroli kaj povas skribi.

Iun fremdan lingvon scipovis legi helpe de vortaro 30%, legi facile 17%, paroli 16% kaj skribi 11%. Tiuj, kiuj parolas aŭ skribas kutime ankaŭ legas facile. Tute ne scipovas fremdajn lingvojn 53% el respondintoj.

La plej ofte scipovata fremda lingvo estas la angla, kiun scipovas proksimume kvarono el ruslandanoj. La dua estas la germana, kiun scipovas 15%. La rusan (kiel fremdan lingvon) scipovas 8%, la ukrainan 1,6% kaj la francan 1,5%.

Inter parolataj lingvoj la plej oftaj estas, apud la rusa, la angla (4,4%), germana (1,4%), ukraina (1,3%) kaj tataro (0,9%) lingvoj. Du fremdajn lingvojn scipovas 7% el ruslandanoj kaj tri lingvojn nur 1%. Paroli du aŭ tri fremdajn lingvojn scipovas nur 2,3% el ruslandanoj.

La lingvoscio estas relative simila kun la censo de Ruslando en jaro 2002, kie inter demandoj estas ankaŭ demando pri lingvoscio. Laŭ censo iun alian lingvon ol la rusan scipovis paroli 33 milionoj da personoj (22,7% el ruslandanoj). La reala nombro estas iomete malpli alta, ĉar tiuj, kiuj scipovas pli ol unu fremdan lingvon ne estas apartigeblaj surbaze de la publikitaj donitaĵoj de la censo. Laŭ la censo la anglan scipovas 4,9% el ruslandanoj, la tataran 3,8% (el kiuj granda parto parolas ĝin kiel gepatran), la germanan 2,0% kaj ukrainan 1,3%. La rezultoj laŭ la censo kaj la enketo kongruas ene de nivelo de statistika eraro de la enketo. La sola diferenco estas en la nombro de parolantoj de aliaj (plejparte minoritataj) lingvoj: la minoritatoj estas malpli reprezentataj en la enketo.

Monsumo sur ĉiu el miliardoj da cirkulantaj sovetiaj monbiletoj estis skribita en la dek kvin lingvoj de la uniaj respublikoj.



Tabelo 1. Plej ofte scipovataj kaj parolataj lingvoj (2007)

Lingvo	Scipovas	Parolas
Angla	23,5%	4,4%
Germana	15,2%	1,4%
Rusa	7,9%	7,9%
Ukraina	1,6%	1,3%
Franca	1,5%	0,2%
Tataro	1,0%	0,9%
Alia eksterlanda	1,3%	0,8%
Alia ekssovetia aŭ ruslanda	2,3%	1,7%

Lingvoscio estas en pli alta nivelo se temas pri lingvoj, kiuj estas lernataj ne nur en lernejo, sed ankaŭ en praktiko (rusa, ukraina, tataro kaj aliaj ekssovetiaj kaj ruslandaj lingvoj). Ankaŭ iu alia lingvo verŝajne estas pli ofte lernata por praktiko, do la lingvoscio estas en pli alta nivelo. Inter aliaj lingvoj plej oftaj estis hispana, korea kaj turka. La angla, germana kaj franca lingvoj estis plej ofte nur lernejoj lingvoj, el kies scipovantoj nur malgranda parto povis ankaŭ paroli la lingvon.

Tiuj, kiuj havas pli altan edukon, pli junan aĝon kaj loĝas en milionurbo, scipovas fremdajn lingvojn pli ofte ol aliaj. Inter sub 30-jaruloj 70% scipovas fremdan lingvon, dum el pli ol 60-jaraj nur 24% scipovas fremdan lingvon. Duono el junuloj scipovas la anglan, sed la germanan lingvon scipovas ĉ. 10-15% en ĉiuj aĝ-grupoj. Ankaŭ la nombro de parolantoj estas pli alta en pli junaj aĝ-grupoj, el sub 30-jaruloj 22% scipovas paroli fremdan lingvon, sed el pli ol 60-jaruloj nur 9% parolas fremdan lingvon. La angla klare gajnas pli da parolantoj en Ruslando, sed la progreso de la angla estas malpli rapida ol oni povus supozi. Kvankam la junuloj kutime lernis la anglan en lernejo kaj duono opinias, ke ili scipovas ĝin en elementa grado, tamen nur 14% el sub 30-jaruloj opinias, ke ili scipovas paroli la anglan.

La enketo malkaŝis ankaŭ, ke la kono de la angla lingvo havas ligan al enspezo kaj vivnivelo: tiuj, kiuj scipovas la anglan havas ofte pli altan vivnivelon. Aparte la parolkapablo de la angla rilatas forte al vivnivela grupo. Verŝajne temas pri tio, ke la lingvoscio donas eblecojn por pli altaj enspezoj, kaj ankaŭ pro tio, ke pli altaj enspezoj donas pli da eblecoj lerni lingvojn kaj praktiki ilin, ekzemple dum eksterlandaj vojaĝoj. La angla estas la lingvo, kiu plej ofte havas rilaton kun la vivnivelo: la aliaj lingvoj estas, kompare al la angla, pli ofte parolataj inter homoj kun malpli alta vivnivelo.

Tabelo 2. Scio de fremdaj lingvoj en diversaj vivnivela grupoj (aliaj fremdaj lingvoj ol la rusa)

Vivnivela grupo	Scipovas fremdan lingvon	Scipovas la anglan	Parolas fremdan lingvon	Parolas la anglan
Ne havas sufiĉe da rimedoj	21%	7%	6%	1%
Aĉeto de vestaĵoj malfacilas	22%	9%	7%	1%
Aĉeto de aliaj varoj krom manĝaĵoj kaj vestaĵoj malfacilas	38%	21%	9%	3%
Ne povas aĉeti vere multekostajn varojn	54%	34%	11%	6%
Ne povas aĉeti dom(et)on	70%	36%	24%	12%
Sen financa problemoj	67%	33%	33%	25%

Jukka Pietiläinen



## Poemoj de Ippolit Bogdanovič

**Ippolít Fjódorovič Bogdanóvič** (1743–1803) devenis el malgrandrusa (ukraina) etbienula familio. Samkiel Sumarokov kaj Ĥeraskov, jam prezentitaj en ĉi tiu rubriko, li okupis kelkajn gravajn ŝtatajn postenojn (fine kiel la direktoro de la Ŝtata Arkivo); same kiel ili, li partoprenis en kortegaj intrigoj, estis framasono, verkis poemojn, fablojn, kaj dramojn, tradukis kaj redaktis...

Sed, malkiel ilin, oni rememoras lin ne pro multaj verkoj, sed precipe pro nur unu poemo — *Animeto* (publ. 1783) verkita surbaze de la antikva mito pri Amoro kaj Psiĥo, konata per *La ora azeno* de Apuleius kaj *La amo de Psiĥo kaj Kupido* de Lafonteno. Bogdanovič sukcesis ironie bildigi per versoj ne historion de diino, sed aventurojn de koketa ĉarmulino, aldoninte iom da rusa folkloro fono, per lingvo senprecedence leĝera en la rusa poezio.

Sed kelkaj el liaj poemoj, jam preskaŭ forgesitaj, havas signifon ne nur historian, sed ankaŭ literaturan.

*Alko*

### MONO

*Ho ve, se mankas mon’; sed kiu fort’ al riĉo  
La homojn tiras? Velkas ja sen mon’ feliĉo,  
Kaj eĉ centjara vi enuos sur ĉi fon’;  
Dum pasas via viv’ — ho ve, se mankas mon’.*

*Ho ve, se mankas mon’; kaj ĉie leĝoj regas,  
Ke monon oni flatas kaj karese flegas.  
Ho mono! Vin mondum’ respektas laŭ impon’  
Kaj ĉiu ĝemas ja: ho ve, se mankas mon’.*

*Ho ve, se mankas mon’; ĉar kurtas vivojaroj,  
Feliĉon devas ligi ni al akaparoj;  
La mono kreas multajn vantojn sen bezon’  
Sed sen la vantoj estas plag’, se mankas mon’.*

1761

### JEN SIGNO DE MALBON’

*Se la amik’  
Por via bono penas en komplik’,  
Kaj kaŝas tion vi de l’ mondo —  
Jen signo de malbon’ do.  
Sed en feliĉo de amoro  
Alia estas la valoro;  
Se vi ne kaŝas ĝin de l’ mondo —  
Jen signo de malbon’ do.*

1763



### MODERECO

*Pri l’ viv’ kontentas mi fiere,  
Kaj jenas la konfirm’ por mia opini’:  
Se ion mi ne havas vere,  
Mi konsideras ĝin neni’.*

1763

### PRI MEMLAŬDADO

*Raciajn agojn vi priridas kun rikan’  
Kaj diras, ke pli saĝas vi ol multaj centoj;  
Mi ne oponas: jes, pli saĝas vi, kompan’,  
Sed ne ol homoj, nur ol kvarpiedaj gentoj.*

1763

### PRI MALICDIRADO

*De vi mi ĉie insultatas,  
Kaj vi de mi sen ĉes’ laŭdatas,  
Sed la komuna plag’ obsedas nin sen fin’:  
En ambaŭ diroj ja neniu kredas nin.*

1763

### VERSOJ PRI AMIKECO

*Sen amikeco hom’ aparte vidas sin,  
Simila al ermito,  
Treniĝas laŭ destin’,  
De ĝojoj senigito;  
Sed per la amikec’  
Multiĝas nia vivospec’.  
Ho vi, ĉiela dono!  
Per vi, ho amikec’, feliĉas ni,  
Per vi intima harmoni’  
Al la sentivaj koroj venis por ekkono.  
Por la anim’ — kvieta rifuĝej’,  
Ho amikec’! Ĉi verson finu inde plej,  
Aperu vi kun rava brilo,  
Konforme al utilo.*

1773

Tradukis el la rusa **Valentin Melnikov**



# Nia libroproduktado en 2007

Ĉiujarajn statistikojn pri la libroproduktado *La Ondo* reprenis en 1991 de *Hungara Vivo*, plu ĉerpante informojn el la rubriko *Laste aperis* de la revuo *Esperanto*. Ĉi tiu rubriko listas ĉiujn librojn, kiujn la libroservo de UEA ekvendis en la aktuala jaro, sendepende de la eldonjaro. Ĉar ne ĉiu eldonita libro estas vendata de UEA kaj ĉar ne nur freŝe eldonitajn librojn ĝi ekvendis, ni aperigas ne nur jartabelojn, sed ankaŭ resumajn tabelojn, kiuj estas pli reprezentaj.

Ordinare ni donas komentojn por la tabelo, sed ofte ili estas ripetataj (same kiel la supra frazo), kaj ĉi-jare la komentoj estas pli mallongaj ol kutime.

En la pasinta jaro surmerkatiĝis 184 libroj, iom malpli ol averaĝe, tamen ili estis pli ampleksaj, kaj la paĝosumo (31 mil 183 paĝoj) estas la plej granda post 2001. Antaŭ 30 jaroj, en 1977, aperis (= "laste aperis") 147 libroj sur 16 mil 897 paĝoj.

Ĉar en 2007 en *Laste aperis* mankis pliaj represoj de diverstemaj franclingvaj artikoloj de Edmond Privat, eldonejo de Tomasz Chmielik *Libro-Mondo* (kaj *Arĥivaro Edmond Privat*) ne plu estas en la jar-listo, sed oni scias, ke Chmielik daŭrigas sian represo-projekton, kaj eble la roterdama libroservo mendos tiajn represojn en 2008. Ni vidis...

En la eldoneja listo plej supras slovaka esperantisto Stano Marček, kiu eldonis 11 divers-lingvajn versiojn de sia rektameta lernolibro.

## 2007. Libroj

S.Marček (SK) . . . . .	11
FEL (BE) . . . . .	10
Impeto (RU) . . . . .	10
Mondial (US) . . . . .	9
UEA (NL) . . . . .	8
A.Cherpillod (FR) . . . . .	6
Edition Iltis (DE) . . . . .	5
Sezonoj (RU) . . . . .	5
Bero (NL) . . . . .	4
KAVA-PECH (CZ) k.a. . . . .	4

## 2007. Paĝoj

Impeto . . . . .	2057
KAVA-PECH . . . . .	1811
H. Buske (DE) . . . . .	1677
FEL . . . . .	1579
Mondial . . . . .	1464
JEI (JP) . . . . .	1454
Sezonoj . . . . .	1296
S.Marček . . . . .	1250
UEA . . . . .	1190
Edistudio (IT) . . . . .	1154

En la resuma listo por 17 jaroj restis la samaj eldonejoj, kaj ene de ĝi *Impeto* kaj *Bero* iom plialtiĝis. Ĉar Ĉina Esperanto-Eldonejo de kelkaj jaroj eldonas nenion, eventuale *Edition Iltis* venont-jare okupos ĝian lokon en la unua landodeko. Tamen nur 5 eldonejoj aperigas averaĝe almenaŭ unu libron ĉiusezone (t.e. 68 librojn dum 17 jaroj).

## 1991-2007. Libroj

Libro-Mondo (PL) . . . . .	127
UEA . . . . .	125
FEL . . . . .	92
Fonto (BR) . . . . .	76
Sezonoj . . . . .	70
Impeto . . . . .	62
KAVA-PECH . . . . .	58
Bero . . . . .	55
Arizona Stelo (US) . . . . .	52
ĈEE (CN) . . . . .	51

## 1991-2007. Paĝoj

Libro-Mondo . . . . .	16587
UEA . . . . .	14455
FEL . . . . .	14306
Arĥ. E.Privat (CH) . . . . .	12553
Ludovikito (JP) . . . . .	12085
Fonto . . . . .	11942
Sezonoj . . . . .	11514
KAVA-PECH . . . . .	11052
ĈEE . . . . .	10161
Impeto . . . . .	9707

Entute, Esperanto-librojn oni *laste eldonis* en 30 landoj.

## 2007. Libroj

Francio . . . . .	23
Ruslando . . . . .	19
Nederlando . . . . .	18
Slovakio . . . . .	14
Germanio . . . . .	13
Japanio . . . . .	12
Belgio . . . . .	11
Brazilo . . . . .	9
USA . . . . .	9
Italio . . . . .	7

## 2007. Paĝoj

Ruslando . . . . .	3790
Germanio . . . . .	2825
Japanio . . . . .	2560
Nederlando . . . . .	2371
Ĉeĥio . . . . .	1974
Belgio . . . . .	1826
Italio . . . . .	1789
Brazilo . . . . .	1727
Francio . . . . .	1688
Svislando . . . . .	1664

Sume, Germanio kaj Francio plu restas supre en la lando-listo. Danke al *Impeto*, *Sezonoj* kaj ACT, Ruslando (kiel prognozite antaŭ unu jaro) devancis Brazilon, kaj Belgio anstataŭis Hungaron en la deka loko.

## 1991-2007. Libroj

Germanio . . . . .	322
Francio . . . . .	302
Pollando . . . . .	279
Nederlando . . . . .	242
Ruslando . . . . .	202
Brazilo . . . . .	193
Japanio . . . . .	174
USA . . . . .	156
Italio . . . . .	137
Belgio . . . . .	126

## 1991-2007. Paĝoj

Germanio . . . . .	40425
Francio . . . . .	35967
Japanio . . . . .	32899
Pollando . . . . .	32047
Ruslando . . . . .	29934
Brazilo . . . . .	27327
Nederlando . . . . .	25911
Svislando . . . . .	21482
Italio . . . . .	19461
Hungario . . . . .	18504

La supra revuo respondas al la demando pri kvanto. Volonte ni aperigus resumon pri beletraĵoj de la jaro, sed la libroservo de UEA, ne nia redakcio, ricevas la librojn.

**Aleksander Korĵenkov**

	1991–2000, sume aŭ averaĝe	2001	2002	2003	2004	2005	2006	2007
Nombro de libroj en/pri Esperanto	2107	222	174	224	183	159	204	184
Suma paĝonombro de ĉiuj libroj	251.276	31.520	26.451	28.424	27.295	23.780	30.078	31.183
Nombro de la eldonintoj	650	109	95	133	103	87	114	93
Averaĝa paĝonombro de unu libro	120.3	142	152	127	149	149	147	169
Averaĝa prezo de unu libro	ž8,22	ž11,2	ž11,6	ž10,3	ž10,8	ž12,7	ž11,7	ž12,0
Lernolibroj, vortaroj pri Esperanto	296	32	43	42	25	19	32	36
Originala beletro	258	21	18	24	21	14	23	23
Traduka beletro	458	57	18	32	45	40	35	36
Planlingvistiko, esperantologio, ling.	229	26	19	15	13	22	21	21
Esperanto: historio, movado k.s.	241	21	42	33	32	27	29	28
Politiko, historio, filozofio, socio	166	22	11	28	21	22	29	13
Scienco kaj tekniko, terminaroj	182	17	8	16	10	4	10	8
Religio	105	6	10	17	6	6	13	9
Aliaj temoj	172	20	5	17	10	5	12	10

# Inter kanono kaj apokrifo

## Recenza eseo de Sergio Pokrovskij

La dua parto de recenzo pri la nova versio de *Biblio*, preparita de IKUE kaj KELI kaj eldonita de KAVA-PECH. La unuan parton vd en LODe, 2008, №1.

### Kanono

Antaŭ 2 jarmiloj aleksandriaj gramatikistoj kompilis liston da modelaj tekstoj greklingvaj, kaj nomis ĝin *kanono*. Antaŭ jarcento la Bulonja Kongreso akceptis malgrandan kolekton da tekstoj kiel *la Fundamenton de Esperanto*.

Intertempe en judismo kaj kristanismo aperis similaj “kanonoj” da tekstoj bibliaj; por ambaŭ temis pri fiksita aro da tekstoj kiujn la koncerna komunumo agnoskas estkiel aŭtentan vorton de Dio (estkiel di-inspiritajn, Θεοπνευμος).

En ĉiuj ĉi tiuj okazoj temas pri etalona kolekto da speciale aŭtoritataj specimenoj, ne pri elĉerpa listo. Ne ĉiu teksto lingve kaj stile modela apartenas al la Fundamento. Ne ĉiu teksto di-inspirita estas kanona teksto biblia.

Nuntempe la ĉefaj kristanaj konfesioj akordas pri la novtestamenta parto de tia listo; sed pri la kanono malnovtestamenta la opinioj varias.

Maldetale, estas tri skoloj kristanaj:

- la minimumisma protestanta, rezultanta en la Londona Biblio (LB);
- la maksimumisma romkatolika — proksimume kiel la recenzata eldono (KB);
- kaj la ortodoksisma, kiu ilin kombinas — proksimume kiel KB.

### La kanono protestanta

Ni konas ĝin per la Londona Biblio. Laŭ sia minimumisma tendenco, la malnovtestamentajn kromlibrojn septuagintajn, kiuj malestas en Tanaĥo, la protestantoj nomis *apokrifoj* kaj forĵetis<sup>1</sup>:

3. La libroj komunlingve nomataj *apokrifoj*, ne estante inspiritaj de Dio, ne apartenas al la Kanono de la Skribo; tial ili havas nenian aŭtoritaton en la Dia Eklezio, kaj estas ne pli aprobindaj aŭ uzindaj ol aliaj verkoj homaj.

La grado de malakcepto de la bibliaj kromlibroj varias: iuj protestantoj tamen agnoskas ilian edifan valoron, kaj presas la kromlibrojn kiel aldonaĵojn inter la du testamentoj; aliaj opinias tion mal-

konvena kaj evitinda (interalie la Bibliaj Societoj, la eldonintoj de LB).

Ĝusta difino de la biblia kanono estas eksterordinare grava por la protestantoj, ĉar forĵetinte la Sanktan Tradicion ili proklamis, ke “Sole la Skribo” (*Sola Scriptura*) estas aŭtoritata fonto de la doktrino kristana. Nu, en la Tradicia Eklezio, ĉu oriente-ortodoksa, ĉu okcidente-katolika, la kanono estis parto de tiu forĵetita Tradicio. Ĉe la protestantoj Biblio ricevis la tutan ŝarĝon, kiun antaŭe portis la Tradicio — tamen samtempe ĝi mem perdis la grundon. Facilas diri, ke Biblio estas simple kaj nure la vorto Dia:

4. La fidindo (authoritas) de la Sankta Skribo, pro kiu ĝi estu fidata kaj obeata, ne dependas je atesto de homo aŭ Eklezio, sed sole je Dio (kiu estas la vero mem), ties Aŭtoro; kaj tial oni ĝin akceptu, ke ĝi estas la Vorto de Dio.

Tamen sen la Eklezio gvidata de la Sankta Spirito, kiel rekoni la aŭtentan di-inspirecon de la koncernaj tekstoj? (Ne tute konsekvence, la ĵus citita Vestminstra kredkonfeso ekleziece difinas la Sanktan Skribon per listo da librotitoloj en sia artikolo 2<sup>a</sup>.)

Protestantoj provis formuli objektivajn kriteriojn, per kiuj oni distingu tekston Fundamentan — pardonu, di-inspiritan — disde teksto homa. Tamen por ke la rezulto ne tro deviu de la atendata, ili aplikis malsamajn mezurilojn.



Kulturo

### Du mezuriloj

Manke de pli aŭtoritata fonto, mi citu el misiista instruilo protestanta, kiu oportune resumas tiajn objektivajn kriteriojn por distingi la *apokrifojn* disde libroj kanonaj kaj di-inspiritaj:

1. Apokrifoj malhavas la aŭtoritaton de aŭtenta vorto Dia, ili estas nek ordonoj nek profetaĵoj.
2. Ili ne estas edifaj kaj nenion rivelacias pri la Mesio.
3. Ilia atribuo estas dubinda.
4. Ili entenas fabelajn absurdaĵojn, historiajn erarojn kaj herezojn.
5. Ilin malakceptis la Dia popolo, por kiu ili estis destinitaj.

Evidente, laŭ ĉi tiuj preskaŭ ateismaj kriterioj endus malakcepti multajn librojn kanonajn, komencante per Torao, la kerno de Tanaĥo.

Jam komence de Torao, la unua ĉapitro de ĝia unua libro rakontas pri la Ĉiela Firmaĵo, kiu disigas la akvojn terajn disde la akvoj ĉielaj, en kiun estas muntitaj la steloj — kaj aliajn *fabelaĵojn* multe malpli kredeblajn ol ĉiuj rakontoj de la kromlibroj bibliaj.

Kaj ĉe la alia ekstremo, fine de Torao, kiun la tradicioj hebrea kaj kristana atribuas al Moseo, ĝia lasta ĉapitro (*Readmono* 34:5,6) konstatas:

Kaj mortis tie Moseo, la servanto de la Eternulo, en la lando Moaba, laŭ la diro de la Eternulo. Kaj li estas enterigita en la valo en la lando Moaba, kontraŭ Bet-Peor; kaj neniu scias lian tombon ĝis hodiaŭ.

Se oni vidas en tio pruvon pri eksterordinara profeta kapablo, kial rifuzi ĝin al la Tria Ezra kaj trakti ties malkoheraĵojn kiel anakronismojn pseŭdoepigrafajn?

Iuj intertitoloj de KB estas influitaj de la biblikritiko; ekz-e la komenco de *Jesaja* havas la intertitolon “La unua parto (Proto-Jesaja): Jes 1–39”; evidente, la editoroj de KB havas dubojn pri *la atribuo* de ĉi tiu tre kanona libro.

Koncerne *la herezojn*, tiu kriterio fakte metas la doktrinon super la Skribon; tiel Lutero malagnoskis la Makabeojn, ĉar la katolikoj indikis al *2Mak* 12:42 pruvante utilon de preĝoj por





Kaj Moseo faris kupran serpenton sur stangon kaj metis ĝin

mortintoj (cetere, inter la instruoj de tiu libro, gravaj por la kristanoj kaj mankantaj en Tanaĥo, oni trovas ke la mondon Dio kreis el nenio, *2Mak 7:28*; pri korpa releviĝo, *2Mak 7:23*; pri senmorteco de la animo, *2Mak 7:9*). Kaj revenante al Torao — sian abomenon de la fremda Ora Bovido ĝi kurioze kombinas kun la ordono (*Nom 21:8,9*) fari kupran serpenton (ĉi tiun ĝenan epizodon la rabenoj pravigas ekzakte tiel, kiel la ortodoksuloj pravigas la rolon de la ikonoj — kaj ĉi tion lastan la protestantoj malakceptas).

Inter la *moralaj instruoj* kiuj povas impresi esperantistojn menciindas la ordono el *Tobit 4:15* —

Kion vi malŝatas, al alia tion ne faru, post du jarcentoj ripetota de Jesuo kaj Hilelo kiel resumo de la tutaj Leĝo kaj Profetoj.

Ĝenerale, estas iom naive ke lernanto juĝu pri la valoro de la instrumentario. Laŭ la ordono-kriterio, la plej valora parto de la Fundamento de Esperanto estus la primitiva 16-regula gramatiketo; dum fakte multe pli instrua estas la Ekzercaro, en kiu la postaj generacioj trovis respondojn al diversaj demandoj kiajn ĝia aŭtoro eĉ ne imagis ĝin verkan-te. Iom simile estas pri *3Joh* — mallongega epistolo havanta formon de privata letero kaj entenanta nenian profetaĵon aŭ moralan instruon, nenian Dian aŭtoritaton ktp. Tia ĝi restis 15 jarcentojn, ĝis kiam ĝiaj lastaj versikloj subite aktualiĝis kiel respondo al la Lutera *Sola Scriptura*:

Mi havis multon por skribi al vi; sed mi ne volas skribi al vi per inko kaj kano; sed mi esperas vidi vin baldaŭ, kaj ni parolos vizaĝon kontraŭ vizaĝo.

El tio ni lernas, ke ne tutan sian

sperton la apostolo lasis en formo skriba; iujn aferojn li transdonis per la viva komunikado; ion oni transdonas per nesribita tradicio.

La 5<sup>a</sup> kriterio estas precipe pikanta en la buŝo de kristano agnoskanta la Evangelion rifuzitan de la popolo al kiu ĝin predikis proprapersono Dio la Filo. (Oni povus respondi, ke multaj judoj tamen kristaniĝis; jes, tamen tiam simetrie eblas diri ke iuj judoj ja honoris la kromlibrojn Septuagintajn; fragmentojn el ili ĉiuj oni trovis en Kumrano — tiom pli interese, ke el la kanona libro *Ester* oni trovis nenion.)

### La kanono romkatolika

De la frukristana epoko la Roma eklezio rigardis ĉiujn librojn de Septuaginto, tradukitajn en Latinon kaj uzatajn en la Okcidenta Eklezio, egale di-inspiritaj kaj aŭtoritataj. Famaj verkoj artaj (pentraj kaj skulptaj) prezentas la epizodojn el la krompecoj ekstertanaĥaj kiel epizodojn bibliajn (Judit kaj Holoferno, Susana kaj la pliaĝuloj, Tobito kaj lia edzino, la kuraco de Tobito...). Nur kelkaj okcidentaj patroj (sed ja la plej kompetentaj pri la Skribo, ekz-e Hieronimo) esprimis dubojn pri la malnovtestamentaj kromlibroj mankantaj en Tanaĥo. Finfine la Trenta koncilio fiksas la definitivan liston, proksimume tian, kian ni trovas en KB (iom diferencas la aranĝo, nomoj de tekstopecoj kaj de la libroj; krome, la *Preĝo de Manase* enestas en KB sed mankas en la Trenta kanono). Kaj —

Kiu malagnoskas sanktaj kaj kanonaj ĉi tiujn librojn, en ilia tuta enhavo kaj en ĉiuj iliaj partoj, kiel ili estas legatitaj kaj akceptataj en la Eklezio katolika kaj kiaj ili enestas en la antikva latina Vulgato; kaj kiu konscie kaj

persiste malagnoskos la establitan tradicion; tiu estu anatemita.

Tiun dekreton plene ripetis la Unua koncilio Vatikana (1871).

Estas iom da troigo en tiu anatemo. Kanono estas decido grava — tamen ĝi ja ne estas dogmo. Unu koncilio difinas kanonon, alia povas ĝin ŝanĝi (tio efektive plurfoje okazis pri la biblia kanono). En la tradiciaj konfesioj pli gravas la Tradicio, tia anatemado pli konvenus ĉe la protestanta rolo de la Skribo; sed en la sekva artikolo ni vidos, ke la protestantoj multe pli libere traktas la Skribon ol la tradiciaj eklezioj.

Nekanonigitajn kromtekstojn de la malnova Vulgato la Trenta koncilio translokis en Aldonon inter la du testamentoj (kiel antaŭe faris Lutero) “por ke ili ne perdiĝu, ĉar fojfoje ilin citas la Patroj”. En KB tiun pozicion sole okupas la *Preĝo de Manase* (sen la du kromlibroj de Ezra).

### Ĉu vere “du kanonoj”?

Baldaŭ post la Trenta koncilio, kaj malgraŭ ĝia emfaza egaligo de ĉiuj libroj “kanonaj”, la katolikaj teologoj tamen sentis bezonon distingi inter la egalaj libroj senkoneste kanonaj, kaj la ĵus enkanonigitaj kromlibroj. Kompreneble la termino “apokrifo” ne estis akceptebla, kaj ili forĝis (unue en 1684) grekecajn vortojn *protocanonicus* kaj *deuterocanonicus*, ofte esperantigatajn per resp. “unuakanona” kaj “duakanona” (ankaŭ en KB). Katolikaj aŭtoroj mem avertas, ke ĉi tiuj terminoj estas misgvidaj, ke estus eraro opinii, ke la Eklezio posedas du kanonojn (kiel ĝi posedas du “testamentojn”); la kanono ĉiam estis unu, la Trenta koncilio nur oficialigis la ĉiaman tradicion (kaj pri la Roma eklezio ĉi tiu aserto ja estas nemalvera). Krome, se temus pri du kanonoj, “la palestina kaj la aleksandria”, tiam ĉiu libro unuakanona estus ankaŭ duakanona, ĉar Septuaginto entenas la tutan Tanaĥon.

Iuj provas savi la terminojn klarigante, ke temas ne pri du kanonoj, sed pri agnoskovico: estis libroj tuj kaj sendispute agnoskitaj, kaj estis libroj kiujn oni agnoskis post iom da tempo kaj ekzameno; nu, en nia nuancoriĉa Esperanto tiun inĝenian interpreton esprimus aparta esperantigo: “unuekanona” (kiel “unuenaskita”), kaj “duekanona”.

### La kanono ortodoksisma

Kompare kun la Biblio slavona-rusa, en KB ankoraŭ mankas la libroj 2<sup>a</sup> kaj 3<sup>a</sup> de Ezra (en la antaŭklementa Vulgato,

resp. la 3<sup>a</sup> kaj 4<sup>a</sup>, ĉar *Nehemja* aperas tie kiel la 2<sup>a</sup> de Ezra, la 3<sup>a</sup> de Makabeoj kaj la psalmo 151<sup>a</sup>. La *Preĝo de Manase* konservas sian naturan pozicion de aldono fine de *2Kr*, en kiu libro estas priskribitaj la cirkonstancoj al kiuj ĝi rilatas (same estis en Vulgato antaŭ la Trenta koncilio; la grekoj ĝin presas aldone al la Psalmaro).

Do, la Malnova Testamento en la slavona kaj rusa Biblio entenas 50 librojn (je 4 libroj pli multe ol la katolika). Tamen la 11 netanaĥaj kromlibroj estas markitaj kiel “eksterkanonaj”. Tiuj kromlibroj estas tamen “honorindaj”, estas malpiaĵo nomi ilin “apokrifo”.

La slavona-rusa Biblio entenas la sumon de Septuaginto kaj Malnova Vulgato; al tiu lasta ĝi ŝuldas la Trian libron de Ezra, kiun la grekoj ne havas.

Por ĉiuj internaj rilatoj praktikaj la bibliaj kromlibroj estas traktataj en ortodoksismo simile al la libroj kanonaj; ili estas uzataj en ortodoksaj diservoj (ekz-e la *Preĝo de Manase* estas voĉelegata dum la Granda Kompletorio kaj estas prototipo de la kristanaj preĝoj pentofaraj; la *Kanton de la tri junuloj* el *Dan* 3:24–90 oni kantas en matenlaŭdo ktp); tial la katolika enkanonigo de tiuj tekstoj ŝajnas paŝo tute logika.

Tamen io (krom la evidenta tradicio kaj la polemiko eksterkonfesia) forte malhelpas tion; ne hazarde la romkatolikoj elpensis la terminon “duakanona”, kaj malgraŭ la anatemoj de iliaj koncilioj gravaj teologoj romkatolikaj ja traktas tiujn duakanonajn librojn kiel malpli aŭtoritatajn ol la “unuakanonajn”; do, reale okazas inverse, malgraŭ la logika decido de la Trenta koncilio la praktiko de la Roma eklezio konformas al la tradicio antikva-ortodoksa.

S-ta Atanazio la Granda, ĉefepiskopo de tiu sama Aleksandrio, kie la romkatolikaj aŭtoroj pretendas trovi la pli vastan “kanonon Aleksandrian”, listiginte la librojn tanaĥajn kaj la novtestamentajn, daŭrigas:

Por plia precizo mi aldonu, ke krom ĉi tiuj estas ankoraŭ aliaj, ne metitaj en la kanonon, sed rekomenditaj de la Patroj por legado al la novuloj kaj kateĥumenoj: *Saĝeco de Salomono*, *Ester*, *Judit* kaj *Tobio* ...

(La kanonecon de *Ester* en la evangelia epoko oni ankoraŭ kontestis, kaj la Nova Testamento nenie ĝin citas.)

Principe la saman traktadon donas Johano la Damaskano (en la 8<sup>a</sup> jc) — laŭ la tradicio de la grandaj orientaj majstroj de la ekumena eklezio, de la unuaj ĝis la lasta.



Tobio suspektas sian edzinon pri ŝtelado  
(Rembrandt, 1626)

## Apokrifo

Etimologie *apokrifo* devenas de greka vorto kiu signifas “kaŝita”. En la kristanan tradicion tiu vorto penetris tra la mito, kiun plej klare prezentas la eksterkanona *3Ezr* 14:44–48 (mi tradukas laŭ la Biblio rusa, en KB tiu libro mankas):

Kaj tiel en 40 tagoj estis skribitaj 94 libroj. Kaj kiam finiĝis la 40 tagoj, la Plejaltulo diris: La unuajn kiujn vi skribis elmetu malkaŝe, por ke legu la indaj kaj la senindaj; sed la lastajn 70 retenu, por transdoni ilin al la saĝaj el la popolo; ĉar en tiuj estas perilo de prudento, fonto de saĝo kaj rivero de scio. Do tiel mi faris.

(Simila motivo aperas en *Dan* 12:4,9; *Apo* 5:1,2.)

Estus eraro apliki ĉi tiun propran kaj originan sencon de la vorto *apokrifo* al la kromlibroj septuagintaj, pretendante ke ili apartenas al la bibliaj libroj kiujn Ezra ne legis publike (malkiel “la unuajn” 94–70 = 24 librojn de Tanaĥ<sup>2</sup>); la mallerteco de tia uzo konsistas en tio, ke la *kaŝitaj*, la esoteraj libroj evidente superas en sia saĝeco kaj valoro la vulgarajn librojn kanonajn, disponeblajn al ĉiu ajnulo; dum kaj Hieronimo, kaj la protestantoj (kaj la ortodoksa eklezio) tute male rigardas la eksterkanonajn librojn kiel malsuperajn ol la libroj de la hebrea kanono!

La kromlibroj de Septuaginto neniam pretendis esti tiaj libroj *kaŝitaj*; tute male, la ekleziaj patroj rekomendis ilin kiel “nutraĵon likvan” al la junuloj kaj kateĥumenoj, ankoraŭ ne spertaj pri la simbola interpreto de la libroj kanonaj (la “nutraĵo malmola”<sup>3</sup>). Efektive, la kromlibroj estas verkitaj pli malfrue, en

pli bona lingvaĵo, en pli evoluinta helenisma civilizo, kaj entenas malpli da kruelaj barbaraĵoj postulantaj alegoriajn reinterpretojn por mildigi la kulturen ŝokon, kia igis Marcionon vidi en Jehovo la despotan dion de la Malbono. Do, ne esoteraj libroj por la saĝuloj, sed facila legaĵo por la eksteruloj kaj komencantoj; ne sekretaj, sed publike konataj kiel la tuta Septuaginto; resume, la bibliaj kromlibroj estas la rekta malo de la *apokrifo* en la rekta, origina senco de tiu termino.

Tamen estis amaso da aliaj verkoj, grandparte gnostikaj, kiuj ja pretendis esti *apokrifo*, la supera saĝo por la iniciitoj. Dum la batalo kontraŭ tiuj herezuloj la vorto *apokrifo* ŝanĝis sian signifon en la eklezia tradicio, ĝi ricevis la sencon “hereza verko kun falsita atribuo”.

Ankaŭ ĉi tiu signifo tute malkonvenas por la kromlibroj bibliaj. La ekleziaj patroj (kaj eĉ multaj protestantoj, komencante per Lutero mem) ja konsentis, ke ili estas edifaj, utilaj kaj piaj, rekomendindaj por la komencantoj; partoj de tiuj verkoj estas uzataj en la diservoj; dirante ke la libroj bibliaj estas “sanktaj kaj honorindaj”, iuj aŭtoroj disigas la epitetojn, rilatigante “sanktaj”n al la libroj kanonaj, kaj “honorindaj”n, al la kromlibroj. Tial la maniero nomi ilin “apokrifo” impresas kiel insulto en la tradiciaj konfesioj respektantaj la patrisman terminaron.

PIV difinas “apokrifo”n protestantisme: “ne akceptita en la hebrea aŭ protestanta kanono”.

Daŭrigota

## NOTOJ

1. Vestminstra kredkonfeso (The Westminster Confession of Faith, A.D. 1647 = Confessio Fidei Westmonasteriensis).

2. La 39 malnovtestamentajn librojn de LB la rabenoj rekombinadis, kunigante po plurajn librojn en unu (ekz-e ĉiujn malgrandajn profetojn) por ke la nombro de libroj en Tanaĥo estu simbole grava, kutime 22 (ĉe Jozefo Flavio) aŭ 24 (en Talmudo).

3. “... vi fariĝis bezonantoj de lakto kaj ne de solida nutraĵo” [Heb 5:12–14].

### En la sekva kajero

Verkoj premiitaj en *Liro-2007*  
Marc Bavant pri landnomoj  
Sergio Pokrovskij pri la nova Biblio  
Recenzo pri la vortarego de Krause  
Ekspresa enketo de *La Ondo*



## Serĉante alian transmondon

Tolkien, John Ronald Reuel. *La Kunularo de l' Ringo* / Tradukis el la angla William Auld; Enkond. Aleksander Korĵenkov. — 2a eld., kor. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 464 pĝ., 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №3).

Tolkien, John Ronald Reuel. *La du turegoj* / Tradukis el la angla William Auld. — 2a eld., kor. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 368 pĝ., 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №4).

Tolkien, John Ronald Reuel. *La reveno de la Reĝo* / Tradukis el la angla William Auld. — 2a eld., kor. — Kaliningrado: Sezonoj, 2007. — 328 pĝ., 500 ekz. — (Serio *Mondliteraturo*; №5).

Frodo Baginzo heredis ringon, kiu montriĝas esti la “Unu Ringo”, forĝita de la malbona Saŭrono por regi la mondon. Naŭpersona kunularo devas porti la ringon al la lando Mordoro por detruigi ĝin en vulkano kaj tiel savi la mondon. La tri volumoj de *La Mastro de l' Ringoj* de multaj junaj homoj en kelkaj landoj estas konsiderataj kiel ĉefverko de la monda literaturo. La lingvaĵo estas bela. Amuzaj dialogoj kaj priskriboj sekvas post poezio kaj priskriboj pri naturaj belajoj kaj kvazaŭhistoriaj tekstoj.

Recenzanto ordinare havas la taskon prijuĝi la kvaliton de verko. Recenzante *La Mastron de l' Ringoj* tio ŝajnas al mi tute nenecesa. La verko havas sian lokon en la monda literaturo, sendepende de la opinioj de la recenzanto. Ne prijuĝante ĝian kvaliton, mi komentos la tradukon kaj kelkajn interpretojn de la enhavo.

### Recenzo pri la traduko

En 1995–1997 aperis la unua Esperanta eldono. En 2007 tiu ĉi trivolumenta traduko de William Auld aperis en sia dua eldono. Tolkien eldonis plurajn versiojn de la verko, kun ialoke gravaj ŝanĝoj en la teksto. Por la unua eldono Auld uzis sufiĉe malnovan version. La dua eldono estas korektita laŭ la plej ĝisdata angla teksto. Kelkaj komposteroj kaj malmultaj tradukeroj estis korektitaj. Pri la korektado helpis multaj esperantistoj menciitaj en la enkonduko.

Al la dua eldono estis aldonitaj enkonduko al la Esperanta eldono, antaŭparolo al la dua angla eldono, *Noto pri la Provincaj Analoj* kaj por esperantistoj interesega artikolo de Tolkien pri Esperanto el 1932. En la dua eldono ankoraŭ mankas ses aldonoj en la tria volumo.

La poemo *Tri ringoj por la elfoj...*, per kiu la verko komenciĝas, ne estas tradukita de Auld, kvankam li estis poeto je Nobel-premia nivelo. Responde al mia demando skribas Bertilo Wennergren: “Kiam mi eksciis, ke li okupiĝas pri tio, mi kontaktis lin, kaj prezentis kaj mian tradukon de la poemo, kaj mian provon traduki la unuan ĉapitron de la libro. Mi tute ne pretendis, ke miaj provoj estas uzindaj aŭ eĉ uzeblaj. Mi faris ilin nur kiel lingvoekzercon (kaj pri Esperanto, kaj pri la Angla). Sed Auld ekŝatis mian tradukon de la poemo kaj petis mian permeson uzi ĝin”.

Auld akceptis ankaŭ kelkajn el la proponoj de Wennergren pri propraj nomoj, sed mem tradukis aliajn. Eble tio kaŭzis ke malsamaj sistemoj por esperantigo de propraj nomoj ekzistas unu apud la alia, ekzemple: *Frodo* (jam la angla formo estas bona Esperanto), *Sam* (sen aldono de -o), *Aragorno* (kun aldono de -o), *Gaja* (Vira nomo uzita en adjektiva formo, same kiel oni ofte esperantigas virinajn nomojn), *Paŝegulo* (traduko), *Grinĉjo* (ĉjo-formo).

Eble Auld havis kialojn traduki la nomojn per malsamaj sistemoj. Tamen montriĝis ke multaj legantoj de la Esperanta versio reagis kontraŭ la bunteco da tradukmanieroj. Eble kiu legis la verkon en alia lingvo, pli forte reagis, ol tiu kiu unue legas la Esperantan version.

Auld estis kandidato por la Nobel-premio, kaj la traduko havas ĝenerale tre bonan kvaliton.

### Komentoj pri la verko

Kial do estis verkita *La Mastro de l' Ringoj*? Laŭdire ĉar la eldonisto petis al Tolkien verki daŭrigon de *La Hobito*, kiu bone vendiĝis. La daŭrigo tamen

fariĝis tute malsamstila ol *La Hobito*. Ne infana fabelo, sed mitsimila fantastaĵo por dekeljaruloj kaj plenkreskuloj. Inspiron Tolkien ĉerpis el multaj fontoj. Ekzistas multaj provoj analizi de kie. La skandinavaj mitologioj en la Edo kontribuis per multaj personaj nomoj. Okazaĵoj kaj estaĵoj estas rekonfeblaj el popolaj fabeloj. La Dua mondmilito — dum kiu verkiĝis la verko — ne povis ne influi la verkinton. La forhakado de arboj kaj la kirasa produktado en Isengardo similas al la industriiĝo de Anglio.

Ni tamen ne povas forgesi ke Tolkien estis pia katoliko. La similaĵoj inter la verko kaj kristanismo estas multaj. Ĉio, eĉ Saŭrono, estis bona en la komenco. Malgranda popolo havas la taskon savi la mondon. Gandolfo mortas, sed releviĝas, post tio li estas blanka. Oni tamen ne sisteme serĉu la similaĵojn, ĉar la Kristosimila Gandolfo ne apartenas al la malgranda popolo k.t.p. Interesan artikolon pri *La Mastro de l' Ringoj* kaj la Fido Kristana de Pastro Edmund Little oni povas legi interrete ĉe <http://mikeleon.orcon.net.nz/signo/tolkien.htm>.

Ne estas strange ke ĝuste katolika gazeto novzelanda origine publikigis tiun ĉi artikolon, ĉar la verko ja estis filmigita en Nov-Zelando.


Ni ankaŭ iom pensu pri la rolo de la verko en la monda literaturo. Verŝajne literaturhistoriistoj tute malsame opinias pri la kvalito de la verko. Tamen ĉiuj devas konfesi ke ĝi ricevis gravan lokon precipe en fantasto, sed ankaŭ en la monda kulturo ĝenerale. Precipe multaj gejunuloj estimegas la libron. Pri tio atestas ekzemple la granda nombro da retpaĝoj kun komentoj pri *La Mastro* k.t.p. Tio povas esti sekvo de la malplifortigo de religioj, precipe en la riĉaj landoj.

Gejunuloj kiuj perdis la kontakton kun la transmondo de religioj, serĉas alian transmondon kaj trovas ĝin en *La Mastro*.

La kovriloj de Vladimiras Beresniovas plaĉe allogas la legonton, almenaŭ mezaĝulon kiel min. Ili tamen estas tute malsimilaj al fantastaj ilustraĵoj, kiuj aperas sur eldonoj en multaj lingvoj. Interesa ideo estus fari ekspozicion pri ilustraĵoj de *La Mastro*. Danan eldonon de la libro ilustris pseŭdonima artistino, kiu montriĝis esti la reĝino Margrethe la 2a de Danio.

Tute inde la Dana reĝino ilustris la reĝon inter fantastaj libroj.

**Leif Nordenstorm**



## Per voĉo klara kaj klera

Almqvist, Carl Jonas Love. *Ormuzdo kaj Arimano: Politika satiro / Tradukis el la sveda Gunnar Gällmo*. — [s.l.]: Gunnar Gällmo, 2007. — 58 pĝ.

“*La regrifuzanto*” kaj aliaj budhismaj fabeloj / Rerakontis Gunnar Gällmo. — [s.l.]: Gunnar Gällmo, 2006. — 84 pĝ.

Ĉi tiuj libroj estas eldonitaj per la lulu-metodo. La aŭtoro (aŭ aŭtoreska morala produktanto) konservas la kopirajton kaj delegas la produktaĵadon al la sistemo [www.lulu.com](http://www.lulu.com), kiu laŭ mendoj ekzempleras la librojn (mi evidente konsentis fari la recenzon por povi lanĉi la verbon *ekzempleri*).

Ĉu pro tiu maltradicia produkto-metodo mi kune recenzas la du verkojn? Krom ke ilin tradukis, respektive, rerakontis la sama Gunnar Gällmo, kion alian ili havas komune? Fakte baldaŭ evidentiĝas al iu leganta la du librojn, ke ili kune havigas al ni la vizion de Gällmo, kiu interligas ilin.

Fabelojn rerakontas multaj. Sed Gällmo ne verkas porinfane; lia vizio temas pri la vojoj de la malinfaniĝo, la kresko, la kompreno de tiu ĉi procezo inter la procezoj.

Jam sur pĝ. 5 de *La regrifuzanto* ni legas “Dek ses mil edzinojn li havis, sed neniu el ili naskis al li infanon; kaj se reĝo ne havas infanon tio ja estas, en fabeloj, tre grava problemo, ĉar en fabeloj ŝtatreganto prefere estu ŝtatregantido.”

Lia tradukito Almqvist en *Ormuzdo kaj Arimano* same ironie substrekas la arbitrecon kaj kapricecon de la surtroniĝo de ŝtatestroj en la reĝa epoko. Ormuzdo, la tiuteksta nomo de ironie prezentata Dio, dekretas pri la reĝoj, “Ke tuj, kiam viro (aŭ virino) en iu regno akiras la superregon, senkonsidere ĉu tio okazas per perforto aŭ per ruzo, aŭ kiel ajn povas al vi supraĵe ŝajni, tio estas la indiko, ke li (aŭ ŝi) ricevis de Ni potencon kaj aŭtoritaton esti via reganto en Niaj loko kaj funkcio, kaj ke Ni lin (aŭ ŝin) dotis kun la saĝeco kaj bona volo necesaj por la regado” (pĝ. 51).

En ambaŭ libroj aperas do reliefigo de la teknikaj rimedoj, per kiuj aŭtoroj de beletra teksto normale estigas ĉe la leganto efektiveco-iluzion. Per tiu reliefigo, la tekstoj instigas ekzameni la procezon de rakontado kaj la formiĝon de tiu iluzio, per kiu rakontoj logas kaj alte-nas la leganton.

La kritiko de iluzioj kaj la ekzamendo de misbildo-kreaj procezoj ja apartenas al la momento de la klerismo, al kiu apartenas Almqvist. Gällmo, se juĝi laŭ lia estetiko, sufiĉe hejmas en la idearo de tiu klerismo por loki pli-malpli en tiu spaco sian vizion. Mi konkludas ĉi tion el la fakto, ke sidas nature en lia stila repertuaro la specifa tipo de ludo aparte klare videbla en jena tekstero:

“Pardonu min,” diris la alia koturno, la koturno tretinta. “Tio ne estis mia intenco. Ne koleriĝu, mi petas!” — “Ne koleriĝu, vi pepas!” diris la unua koturno, la koturno tretita. “Ne via intenco, ĉu?” (*La regrifuzanto*, pĝ. 58).

La uzo ĉi tie de “pepas” por emfazi mokan eĥadon de pardonpeto signas tiun proksimecon inter la kritikemo kaj la ridemo/mokemo, kiu karakterizas la klerismon. La kritika metodo de la klerismo instigas vin lerni de la ridpunktoj — via propra aŭ tiu de la redaktoro de *Monato* aŭ de alia ŝatata periodaĵo — por forridi viajn maltaŭgajn sintenojn kaj aliajn enradikiĝintajn erarojn.

En Gällmo, kiu estas budhano kaj atentis tiujn procezojn, per kiuj formiĝas niaj pensoj pri ĝusto kaj pravo, la klerisma kritikemo direktiĝas eĉ kontraŭ la formiĝo de niaj maleraroj, niaj pravoj, la bazo mem de niaj plej rektaj fidoj kaj kredoj. Per tiu direktiĝo, la kritikemo vidigas tiun bazon kiel senbazan, kiel nur-proceze-formiĝintan.

Tiu vidigo donas al via okulo la novan povon rigardi la rigardadon mem kaj tiele liberigi vin el la kateneco de tiuj bazaj deziroj, kiuj faras el la procezoj “vin”.



Mi studis universitate la palian, kaj du el miaj profesoroj estis budhanoj. Ĉe ili, la budhana identeco lasis relative senŝanĝa ilian apartenon al la sama etburĝa bengalaro kiel mi, kaj tial mi ne lernis rigardi la budhaniĝon kiel kulturelajn elmigron. Amikiĝinte kun brita budhano jarojn poste, mi konstatis, ke ankaŭ okcidentanoj, kiuj elektas fari el si budhanojn, ne nepre elektas forlasi sian kulturelan etoson.

La fakto, ke Gällmo ne nur uzas budhisman materialon kiel verkan ercon sed estas mem budhano, interese fleksas al ni la legajn muskolojn en *La regrifuzanto*. En la teksto *Ormuzdo kaj Arimano*, la traduka interveno de Gällmo — ĉiu traduko estas relego — preskaŭ faras el la momento de la frua okcidenta klerismo mem praformon de imagebla estonta budhaniĝo de la tuta socia etoso en la okcidentaj landoj. La klarvideco pri la procezoj anstataŭas, en tiu ĉi vizio, la idealon de la memstaro — ĉar la budhano ne agnoskas la memon krom kiel produktaĵon de procezoj, kiuj fariĝas kaj kiuj do nepre malfariĝos.

Al la kerna klerisma celo de la malmistifiko servas diversaj gestoj de sindistancigo. En *La regrifuzanto*, tiuj gestoj havas la guston de spicaĵoj: “Ĉi tio okazis en kulturo, kie familio tre gravis” (pĝ. 24); “En la kabano loĝis anakoreto. Anakoreto estas, laŭ la vortaroj, pia ermito kiu vivas sola por tiel fari bonon al si mem kaj al aliaj. Sed ĉi tiu anakoreto ne posedis vortaron, kaj li fajfis pri tiaj difinoj” (pĝ. 39-40); “[pri elefanto] Ĝi alkuris kiel peza lokomotivo (se oni ne tro zorgas pri la fakto ke lokomotivoj tiutempe ne ankoraŭ ekzistis)” (pĝ. 11). Gällmo bonvene ridindumas ankaŭ por nin ride distancigi de nia verda kulturo: “Vi ne kapablas esti monaĥo. Vi ja estas stulta, ja eterna komencanto” (pĝ. 28). En *Ormuzdo kaj Arimano*, teksto tute ne alinfana eĉ sur la maska nivelo, la distancigaj gestoj veftas la tutan teksaĵon.

Ni nun trovas nin en momento, kiam ĉiuj niaj socioj, inkluzive de la esperantistaj, bezonas ĉiam pli da hela kaj bonhumora malmistifikado, kio igas absolute ĝustatempe la klaran, kleran voĉon de Gunnar Gällmo. Li tradukis la religian klasikaĵon *Darmo-pado*, sed ne volis sin limigi al la pasinteco, kaj do nun elektis formojn, kiuj renesancas la budhisman — aŭ la por budhismo anekseblan — paseon por nia hodiaŭa humoraro.

Mi, kiel hinduo, kiu jam de jardekoj legas la hinduismon de la bengaloj (kiuj



estis budhanoj ĝis iuj fortoj el aliaj regionoj de Barato trudis al Bengallando la refasonitan hinduisman ortodokson) kiel rekonturiĝintan budhismon, ĉiam multon gajnas el la legado de budhanaj tekstoj, precipe de la bonhumoraj. Mi forte kaj alte rekomendas al vi la legon de ĉi tiuj libroj.

Vidante, ke mi alvenis al la fino de la substanca recenzo, iuj legantoj interjekcios: sed kiuj estas tiuj Ormuzdo kaj Arimano? Tiuj figuroj aperis en la prapersa kulturo, kiun en Persio forlavangis la alveno de islamo, kaj kiun daŭrigas en Barato la parsioj, sekvantaj ĝis hodiaŭ la antikvan religion de Zoroastro/Zaratuŝtro. (Ĉu vi ne konas tiun figuron ĉe Niĉeo?) Laŭ la zoroastrana tradicio la absolute bona Ormuzdo kaj la absolute malbona Arimano estas en eterna konflikto. El Arimano Almqvist kreas pozitivan figuron. Tamen, ĉu Almqvist partoprenas la orientisman projekton de la deknaŭa jarcento, kies draŝa kritiko fare de Edward Said lasis la okcidentanajn tradiciojn de orientologio strebantaj rekompreni siajn starpunktojn? Tiun pli intertekstan juĝon mi lasas al la leganto.

De recenzantoj oni atendas iom da provlegado. Jen mia listo (kiu ne inkluzivas frazojn de la formo “tio estas tute bone”, kiujn Gällmo sisteme kaj evidente intence uzas): *tiu “maskita plebaro”* (OA pĝ. 8) devus teksti **plebo**; *prezentas sin kiel liberanimaj* (OA pĝ. 8) devus teksti **liberanimajn**; *historion kaj lingvistikon kiel pli trankvilaj* (OA pĝ. 10) devus teksti **trankvilajn**; *intence plantitan kiel ilon* (OA pĝ. 30) devus teksti **ilo**; *kies du regnoj ili prezentos, och kies popoloj ili nutros* (OA pĝ. 49) devus teksti **regnojn ili prezentos kaj kies popolojn**; *ne plu restas multe da tiuj meritoj* (R pĝ. 6) devus teksti **el tiuj meritoj**; *kaj li diris tion al la veturigistom* (R pĝ. 19) devus teksti **veturigisto**; *ricevis donacon de kelkaj konatuloj* (R pĝ. 62) devus teksti **konatoj**.

Mi cerbumis, ĉu menciis kiel eraron la elekton, ekde R pĝ. 73, de *Fingroringo* kiel traduko por *Angulimala*. Sed la pli laŭvorta “Fingroĉeno” ne estus nepre pli bona, kaj tian ŝlosilan vortelekton en tradukaĵo destinita por klasikigo neniuj recenzanto povus per kritiko aliigi eĉ se la redono ja estintus maltaŭga. Mi deziras al ĉi tiuj tekstoj de Gällmo vastan legatecon, kaj rimarkigas, ke al la lulu-eldonejo mankas eldonista memo, kio aparte kongruas kun la budhana projekto dissolvi la memojn!

**Probal Dasgupta**

## Trezorkesteto

**Duoble unu. Sen lim’ ĝis: KD. — Crest: Duoble unu, 2007.**

Jen nova kanzon-KD de *Duoble unu*, distribuata de *Vinilkosmo*.

Mi jam aĉetis perrete tiun kodiskon ĉe Vinilkosmo, ne sciante, sed antaŭdivenante, ke ĝi povus esti eksterordinaraĵo, ĉar tuj plaĉis al mi la penso migri per kantoj tra la mondo trans ĉiujn limojn. Tiel, kiel faris tion jam, ekzemple, Woody Guthry kaj Bob Dylan. La moderna muziko estus malpli riĉa, se ne ekzistus la kantoj, kiuj akompanas tutajn popolojn en sia ofte sopirplena vivo. Kiom da kantoj ekestis survoje! Tiu motivo trairas la tutan muzikhistorion, egale ĉu la muzikistoj marŝis piede, veturis per trajnoj aŭ perŝipe aŭ hastis de turneo al turneo sur grandegaj kamionoj.

Mi mem kolektas kun granda ĝojo popolmuzikajn kantojn el la tuta mondo, kelkajn gravajn el ili mi tradukis kun plezuro. Do en tiu senco mi estas jam fakulo pri kanzoneca muziko. Kaj efektive, eĉ en tiu ĉi kazo de *Duoble unu* mia bona kolektistoflarnazo ne trompis min. La disko de la kompanio *Duoble unu* estas ne malpli ol majstroverko, trezorkesteto kaj pri poezio kaj pri tre varia kanzoneca kaj parte tipe franca muziko.

## Konu nin, ŝatu nin!

**Solly, Martin. La Ksenofobia Gvidlibro al la italoj / Tradukis el la angla Anna Löwenstein. — Milano: Federazione Esperantista Italiana, 2006. — 72 pĝ.**

La prezentata libro estas la unua, (kaj ne lasta!) esperantlingva traduko el la origine anglalingva projekto *The Xenophobe’s Guides* — ksenofobiaj gvidlibroj, kies celo estas duonserce-duonserioze konatigi alilandanojn kun karakteraj trajtoj kaj apartaĵoj de diversaj popoloj. Tio estas ĝia principa distingigo de kutimaj gvidlibroj, kiuj ĉefe priatentas vidindaĵojn, ripozejojn kaj tipajn pladojn-drinkaĵojn.

La libro similas al pli frua ruslingva eldono. Koincidas ĉio — poŝformato, kovrilbildo, eĉ la bindaĵo estas same aĉa — kiam vi malfermos la lastan paĝon ĉiuj aliaj jam delonge estos for! Ambaŭ verŝajne prunteprenis dezajnon de sia anglalingva praulo. La titolo de ĉi recenzo estas la devizo de tiu serio.

La teksto mem estas konciza, senenua kaj informplena. Ĉiuj flankoj de socia kaj privata vivo de modernaj italoj

La disko plenas de spritaj ridetigaj ilustraĵoj al la tekstoj, kiuj mem estas tre instruaj kaj por infanoj kaj por plenkreskuloj. Tial oni ne povas diri, ke la disko estas farita por infanoj aŭ por plenkreskuloj, sed ĝi estas tre humurplena kaj pri la temoj kaj pri la muziko.

La kantoj estas prezentataj eĉ en tre bone komprenebla Esperanto, kiu lasas nur malofte malferma iun deziron pri ebla plibonigo. Krome ĝi estas disko, kiu estas farita de tre spertaj profesiaj artistoj, kiuj per tre belaj voĉoj akompanataj de perfekte aranĝataj muzikaĵoj, entiras nin en la miraklomondon de mirinde vasta vivanta muzika kosmo.

Jen disko, kiu ravis min tuj dum la unua aŭskultado. Sed je la dua fojo eĉ ankoraŭ pli. Estas eĉ tiel: ju pli ofte oni aŭskultas ĝin des pli bona ĝi fariĝas. Jen grava signo por ĉiu bona disko.

Tiu, kiu ŝatas poezion kaj ideo riĉan muzikon, efektive povas duoble ĝoji pri tiu ĉi produkto de *Duoble unu*. La disko nomiĝas laŭ la surkovrila ŝildo de Fransŭaz kaj Patrik, kiuj vagas en kantoj kvazaŭ trampo tra la mondo: “Sen lim’ ĝis...”

Aldona lukso de la dikso estas du gajaj fotaroj kun muziko de la KD, kiuj sur komputilo rigardeblas kaj aŭdeblas.

**Hans-Georg Kaiser**

— familia vivo kaj rilatoj kun eksterlandanoj, kutimoj kaj obstinoj, religio kaj krimo: ĉi ĉion kaj ne nur entenas tiu apenaŭ 70-paĝa libreto. En ĝi troviĝas ankaŭ multaj interesaj faktoj: kiu estas vera kazo de aĉeto de la teamo *A.C. Milan* fare de Silvio Berlusconi, kial italoj ne partoprenas en la Eŭrovida Kanto-Konkurso, kiom pli longaj estas italaj kondomoj ol tiuj en la cetera Eŭropo...

Interalie, jen estas vera defio por la monda esperantistaro: anstataŭ traduki el tiom kritikata kaj blasfemata angla lingvo, lanĉi propran similan serion. Ĉu ne inda tasko plenumebla por landaj kaj eĉ regionaj asocioj kaj demonstrado de deklarata internaciismo?

Resume, estas tri kialoj por tralegi la libron: se vi jam estis en Italio, tio eble helpas al vi penetri la kaŝitan sencon de certaj momentoj; se vi nur planas vojaĝon, vi certe eksentos vin pli libere en nova lando kaj evitos tiklajn situaciojn; se vi neniam vizitis la Apeninan Duoninsulon kaj neniam faros tion, vi povos dum kafoklaĉo senĝene rimarkii: aĥ, tiuj italoj! Nu certe mi konas ilin!

Do, konu ilin, ŝatu ilin!

**Nikolaj Penĉukov**

## La Unua Libro

Ĉi-rubrike ni prezentos dek librojn, kiuj grave influis la evoluon de Esperanto lingve, socie kaj kulture. Ĉi tiu rubriko estas kleriga; ĝi celas tiujn, kiuj jam senprobleme legas en Esperanto, sed ankoraŭ ne bone konas ties historian kaj kulturalan fonon.

14 jul 1887 (26 jul laŭ la Gregoria kalendaro) en la presejo de Ĥaim Kelter (Varsovio) aperis 42-paĝa broŝuro *Internacia lingvo. Antaŭparolo kaj plena lernolibro (por rusoj)*. Ĝia aŭtoro, 27-jara ruslanda judo Ludoviko Zamenhof, kaŝis sin sub la pseŭdonimo “D-ro Esperanto”. Ĝis la jarfino aperis pola, franca kaj germana eldonoj de la verketo, kiu poste ricevis la “popolan” titolon: la *Unua Libro*. Sekvis eldonoj en pluraj aliaj lingvoj.

La *Unua Libro* konsistas el kvar partoj, inter kiuj la plej ampleksa estas ne la *Plena lernolibro*, sed la *Antaŭparolo* (pĝ. 3–30). Unue, Zamenhof mencias la problemojn kiujn la diverslingveco kaŭzas en ĉiuj sferoj de la vivo, kaj atentigas, ke ĝi kaŭzas ankaŭ malamikecon inter la popoloj. Same kiel multaj lingvoprojektantoj, li kredas ke lingvo internacia havus grandan praktikan signifon por scienco kaj komerco, sed li emfazas, ke

grandegan utilon alportus al la homaro lingvo internacia, kiu, *ne entrudiĝante en la doman vivon de la popoloj*, povus, almenaŭ en landoj kun diverslingva loĝantaro, esti lingvo regna kaj societa.

Efektive, Zamenhof volis solvi ne nur la lingvan problemon, kaj post pluraj jaroj li konfesis:

... mi de la plej frua infaneco fordonis min tutan al unu ĉefa ideo kaj revo — al la revo pri la unuiĝo de la homaro. Tiu ĉi ideo estas la esenco kaj celo de mia tuta vivo, la afero Esperanta estas nur parto de tiu ĉi ideo. (MEH, pĝ. 100)

Sed en la *Unua Libro* Zamenhof ne longe haltas ĉe tiu ideo kaj traktas, ĉefe, lingvajn aferojn. Presentante la historion de la lingvoprojektado, li konstatas, ke por lingvigi projekton oni devas solvi tri taskojn, kaj ke en neniu antaŭa projekto estis solvita pli ol unu tasko, sed li sukcesis solvi ĉiujn tri.

1) La lingvo estu eksterordinare facila, tiel ke oni povu ellerni ĝin ludante. — Tion li solvis per simpligo de la



gramatiko, kiun “oni povas bonege ellerni en la daŭro de unu horo”, kaj per regula vortfarado helpe de prefiksoj kaj sufiksoj.

2) La lingvo jam de la komenco mem kaj dank’ al sia propra konstruo povu servi kiel efektiva rimedo por internaciaj komunikigoj. — Por tio li “aranĝis plenan *dismembrigon* de la ideoj en memstarajn vortojn, tiel ke la tuta lingvo, anstataŭ vortoj en diversaj gramatikaj formoj, konsistas sole nur el *senŝanĝaj* vortoj”. Li donis ekzemplon de tio, ke alilandano ne konanta la rusan kaj ruslandano ne konanta la lingvon de la alilandano, povas interkompreniĝi, eĉ ne konante la lingvon internacian, nur helpe de vortaroj.

Doninte ses tekstojn en sia lingvo — *Patro nia*; *El la Biblio*; *Letero*; *Mia penso* kaj *Ho, mia kor’* (du poemoj de Zamenhof); *En sonĝo princinon mi vidis...* (poemo de H. Heine tradukita de Zamenhof) — li klarigas la trian taskon:

3) Venki la indiferentecon de la mondo kaj igi ĝin kiel eble plej baldaŭ kaj amase komenci uzadi la proponatan lingvon kiel lingvon vivan, ne en okazoj de ekstrema bezono. — Konsciente, ke oni ne lernas lingvon, kiun neniu uzas, li proponis tutmondan kampanjon, por ke oni promesu ellerni la internacian lingvon, “se estos montrita, ke dek milionoj personoj donis publike tiun saman promeson”.

Zamenhof anoncis, ke la adresaro de la dek milionoj da promesintoj (voĉdonintoj) aperos en aparta libro (cent milpaĝaj adresaregoj kun cent adresoj ĉiupaĝe!), kaj avertis:

Poste ne estos pravigitaj antaŭ la socio la personoj, kies nomoj ne estos en la voĉdon-libro, nek en la fako de la promesintoj, nek en la fako de la kontraŭintoj. Neniu esperu pravigi sin per tio, ke li “ne aŭdis” pri la proponita voĉdonado, ĉar estos uzitaj ĉiuj rimedoj por ke ĉiu sciu pri la voĉdonado.

Krom la antaŭparolo en la libro estis ankaŭ:

— ok eltranĉendaj slipoj (du folioj) kun promesdeklaro (pĝ. 31–34);

— plena lernolibro de lingvo internacia sur ses paĝoj: alfabeto, partoj de parolo (ok reguloj), ĝeneralaj reguloj (ok reguloj) — entute 16 reguloj (pĝ. 35–40);

— permeso traduki la broŝuron al ĉiuj ceteraj lingvoj (pĝ. 41) kaj la adreso de la aŭtoro (pĝ. 42);

— vortaro internacia-nacia (en la rusa 917 radikoj) sur du flankoj de granda folio.

Sur la dua paĝo estis presita ruslingva deklaro:

Lingvo internacia, simile al ĉiunacia, estas socia propraĵo; la aŭtoro forlasas por ĉiam ĉiujn personajn rajtojn al ĝi.

Zamenhof petis sendi kritikon pri la projekto kaj promesis utiligi la plej bonajn proponojn en speciala broŝuro, kiu fiksos la definitivan lingvoformon. Post eldono de la broŝuro la novan lingvon rajtos ŝanĝi ne li, sed nur kompetenta akademio, kiu “povos laŭgrade kaj nerimarkate fari ĉiajn necesajn plibonigojn, eĉ se ĝi estos devigita poste ŝanĝi la lingvon ĝis nerekonlebleco”.

Zamenhof dissendis la *Unuan Libron* al diverslandaj redakcioj, societoj, kleruloj. Li aperigis en gazetaro (precipe en Ruslando) plurajn anoncojn, sed li ne ricevis dek milionojn da promesoj.

Tamen al li venis centoj da leteroj (pozitivaj, negativaj kaj ŝercaj), kaj eltranĉitaj slipoj kun deziresprimo lerni la novan lingvon sendepende de la nombro da ricevitaj “promesoj”. La projekto eklingviĝis, kaj la pseŭdonimo de la aŭtoro iom-post-iom iĝis ĝia nomo — Esperanto.

Kvankam Zamenhof skribis en la *Unua Libro*, ke li dum unu jaro eldonos nenion en la nova lingvo, li jam en januaro 1888 eldonis ĉe Kelter *Duan Libron de l’ lingvo Internacia. Kajero №1* por resumi kaj respondi la ricevitajn leterojn.

**Aleksander Korĵenkov**



## Fabelkonkurso 2007

Ĉi-foje partoprenis 850 fabeloj al finlingva konkurso, 10 konkursaĵoj al samealingva konkurso, kaj 11 konkursaĵoj en la Esperanta konkurso.

La fabelfestoj okazis en hotelo *Herikko* en Taivalkoski. Direktorino de Päättalo-Instituto, Liisa Kurkinen, anoncis la rezultojn. Gazetoj *Kaleva* kaj *Koillissanomat* menciis esperantlingvan konkurson.

### Rezulto de la Esperanta konkurso

#### Kategorio A, malpli ol 9-jaraj

1. *La malbona suno* de Chiara Goethals (Belgio)

#### Kategorio B, 9–10-jaraj

1. Ne aljuĝita
2. *Merlo Joĉjo* de Michaela Hanušová (Ĉeĥio)
3. *Leporeto* de Dominika Švendová (Ĉeĥio)

#### Kategorio C, 11–13-jaraj

1. *Draketo* de Katka Morkesová (Ĉeĥio) — premio *Fabelo Internacia*
2. *Bestpiedeto* de Zagneta Jandourková (Ĉeĥio)
3. *Kiu nenion scias, tiu nenion timas* de Eliška Šplíchalová (Ĉeĥio)

Aini Vääräniemi

## La Verko de la Jaro: Ses kandidatoj

*Eklipsas* de Jorge Camacho, *Kantoj de Anteo* de Mao Zifu, *La lingvo serena* de Baldur Ragnarsson, *Miozoto* de Margarethe-Greta Stoll, *Moskvaj sonoriloj*. *Antologio de verkoj de moskvaj poetoj-esperantistoj kaj Prefere ne tro rigardi retro* de Eli Urbanová estas la kandidataj titoloj por la PEN-premio *La Verko de la Jaro* 2007.

La poemarojn, surmerkatigitajn en 2006/2007, proponis almenaŭ tri membroj de la Esperanta PEN-Centro, kaj la finan voĉon havos la abonantaro de la revuo *Literatura Foiro*, kiuj per referendumo ĝis 30 apr 2008 esprimos sian preferon.

La premio estas asignita al poeziaj aŭ prozaj verkoj, laŭ alternaj jaroj.

HeKo

## Ricevitaj libroj

Almqvist, Carl Jonas Love. *Ormuzdo kaj Arimano*: Politika satiro / Tradukis el la sveda Gunnar Gällmo. — [s.l.]: Gunnar Gällmo, 2007. — 58 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

de Seabra, Manuel. *Ĉu nur unu civilizacio?* — Thaumiers: LKK, 2007. — 23 pĝ., il. — (La KromKancerKliniko, №22). — [Donaco de LKK].

Eroŝenko, Vasil. *Fabeloj kaj legendoj* / Kompilis Vladislav Taranjuk. — Kievo: Vadim Karpenko, 2007. — 112 pĝ., il.; 1000 ekz. — [Donaco de Julia Patlanj].

[Gällmo, Gunnar]. *“La refrifuzanto” kaj aliaj budhismaj fabeloj* / Rerakontis Gunnar Gällmo. — [s.l.]: Gunnar Gällmo, 2006. — 84 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

*Kuuopio poŝformate*: Gvidlibro. — Kuopio: Urbo Kuopio, [2007]. — 24 pĝ., il. — [Donaco de EAF].

Solly, Martin. *La Ksenofobia Gvidlibro al la italoj* / Tradukis el la angla Anna Löwenstein. — Milano: Federazione Esperantista Italiana, 2006. — 72 pĝ. — [Recenzoekzemplero].

Срошенко, Василь Якович. *Казки та легенди* / Переклад з есперанто Н. Андрианової-Гордієнко, Є. Ковтонюка, В. Таранюка. — Київ: Вадим Карпенко, 2004. — [Donaco de Julia Patlanj].

## Ricevitaj gazetoj

Antaŭen, 2007/12; Aŭstria Fervojisto, 2007/3; EAB Update, 2008/40; Esperanta Finnlando, 2007/6; Esperanto aktuell, 2007/6; Esperanto sub la Suda Kruco, 2008/1; Esperanto, 2008/1; Esperanto-Infomilo por Berlino kaj Brandenburgio, 2007/11; Freŝo, 2007/20; Ĝenerala Infomilo, 2007/146; Heroldo de Esperanto, 2007/15; Informa Bulteno, 2007/4; Infomilo por Interlingvistoj, 2007/4, 2008/1; Infomilo, 2007/10,11,12; KAE-Infomilo, 2008/61; Kontakto, 2007/5; La Gazeto, 2007/133; La Movado, 2007/682; La Ondo de Esperanto, 2008/1; La Sago, 2007/39; Literatura Foiro, 2007/230; Litova Stelo, 2007/5,6; Mikrofono, 2007/19; Monato, 2008/1; Norvega Esperantisto, 2007/6; Pola Esperantisto, 2007/6; REGo, 2007/6; Scienco kaj Kulturo, 2007/5,6; Sennaciulo, 2007/11; Service de Presse, 2007/39; Svisa Esperanto-Societo Informas, 2007/4; Tempo, 2007/97; Verda Saksofono, 2007/19.

## Gazetoj

### Literatura Foiro, 2007, №230

Kiel kutime, la uverturo estas poezia: per du originalaj poemoj Venelin Mitev kondukas ŝvebe inter frosto kaj festo. La temo pri originala literaturo ĉeestas ankaŭ per la artikolo de Giorgio Silfer *1907, la jaro de du romanoj*: antaŭ jarcento tiu ĝenro proponis du gravajn novaĵojn — la pli ol 500-paĝan originale esperantan *Kastelo de Prelongo* de Henri Vallienne, kaj *La knaboj de Paŭlo-Strato* de Ferenc Molnár, kies esperantigon realigas Spierer en 1937.

Mondliteraturo. Donald Broadribb tradukis la studon de Lynda Scott *Similecoj inter Virginia Woolf kaj Doris Lessing*. Christian Declerck revenas al *Leteroj el mia muelejo* de la franca verkisto Alphonse Daudet.

2007 estas la Goldoni-jaro. Jen la dua akto de *La kafejo*, en traduko de Carlo Minnaja. Armando Zecchin malkovras la signifajn momentojn en la vivo kaj la teatra kariero de Goldoni.

Kulturpolitiko. La revuo informas pri la ekspozicio pri la esperanta prozo kun literatura kafejo en la Fremdlingva biblioteko en Budapeŝto kaj la kolokvo pri la esperantaj bibliotekoj kaj arkivoj en Vieno.

Historio. Andy Künzli revenigas al la unua postmilita UK, okazinta 1947 en Berno. La Konsulo de la Esperanta Civito klarigas sian aliĝon al la publika alvoko forviŝi la nomon de Francisco Franco el la listo de la altaj protektantoj de Universalaj Kongresoj.

La centjarigo de la Ido-skismo ĉeestas per la traduko de artikolo de Otto Jespersen (1912). Daŭras la esploro de Claude Gacond pri la vivo kaj didaktika kontribuo de Louis de Beaufront.

Denove gastas Radosław Nowakowski per siaj meditoj, ĉi-foje per eseo pri limo inter arto kaj tio, kio ne estas arto.


HeKo



Por la decembra tasko *Dialogo en la kosmo* venis naŭ respondoj, kiujn sendis Malcolm Jones (Britio), Erkki Kempainen, Bruno Lehtinen (Finnlando), Louise Marin (Francio), Pere Palà (Hispanio), Dorota Burchardt, Hanna Skalska (Pollando), Anatolo Gončarov (Ruslando) kaj Brigitta Anevik (Svedio). Lotumado ne necesis, ĉar en ĉiu respondo, krom unu, estis ellasitaj po unu ĝis tri titoloj. Libropremion ricevas **Pere Palà**. Ni gratulas!

La ĝustaj respondoj: Saluton! / Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo / Mondcivitanoj / Plejo / Tragedio en la universo / Dis! / La verda raketo / Ĉu vi konas la teron? / La infana raso / La tragedio de l' homo / Vere aŭ fantazie / Survoje al universala civilizacio. Malkaŝiĝis eĉ la dek-tria titolo: Mondo.

## Oblikva krucvortenigmo



1. Kemia elemento Si; 2. Nokta rabobesto nutranta sin per kadavraĵoj; 3. Resanigejo; 4. Signo de Zodiako (=Pafisto); 5. Budhana monaĥo; 6. Kantbirdo; 7. Ĉefurbo de Turkio (R); 8. Tabulludo por du personoj; 9. Ina signo de Zodiako; 10. = Azoto; 11. Kunfiksilo (R); 12. Densa arbaro, loĝata de multaj sovaĝaj bestoj; 13. Lando en sudorienta Azio aŭ en okcidenta Eŭropo (R); 14. Monunuo de Islando, Norvegio aŭ Svedio; 15. Animala mondo; 16. Frato de patro aŭ patrino.

(R) — skribu nur radikon sen la finaĵo.

Viaj respondoj venu al la redakcio poŝte aŭ rete antaŭ la 15a de marto 2008.

Kompilis **Viktor Alikin**

Danke al lavanga populariĝo de ciferecaj fotiloj, ni ricevas amason da fotoj elektronike. Sed ĉi-foje ni ricevis kelkajn pentritajn bildojn pri la Zamenhofa Tago en Tajvano, kiun 70 personoj kunfestis en la lingva kolegio Wenzao en la urbo Kaohsiung.

Cho Chao-Ming, la aŭtoro, konata ankaŭ kiel Abengo, skribis pri la dekstre publikigita bildo:

«En la Zamenhof-festo ni havis programon de gejunuloj *Ĉu vi volas danci?* Mi kiel ĉeffestozorganto ne povis foti, tial mi faris ĉi-desegnaĵon».

## Spritaĵ splitoj kaj preskeraroj

el la kolekto de reduktoro

### Ĉu kongreso nur por parolkapabluloj?

La Unua Niĝeria esperanto kongreso...post vigla kaj longa debato, bedaŭras ke; — Mutaj kiuj estis invitataj ne povis partopreni la eventon... (Rezolucio de la Unua Niĝeria E-kongreso, 15–17 dec 2006, Badagry; rimarkis Kalle Kniivilä)

### Ĉu kongreso la 35-an de mayo?

39a Internacia Infana Kongreseto... Kotizoj en eŭroj: Limdatoj: 31.februaro.2008 (<http://bertosch.free.fr/iik2008/#kotizo>, stato 12 jan 2008)

### Je la barbo de hofi!

Estas tempo por redoni al virinoj kaj al neeŭropanoj sian lokon en Esperanto, ne tuŝante la Fundamentono. hofi! (Renato Corsetti: *Ĉi tiu Esperanto estus turka, se oni legus la intencojn de Zamenhof!* // *Nordhungaria Informilo*, 2008, januaro, pĝ. 14)

### La aganto pola, ĉu plene sola?

En nia sabata "Esperanto ekspreso" nia gasto estas Antoni Dorosz el Radom, la aganto de Pola E-Asocio. (E-Redakcio de Pola Radio, <http://groups.yahoo.com/group/landa-agado/message/11920>, 4 jan 2008; rimarkis Kalle Kniivilä)

### Kaj jen kulo pola, certe ne sola

Internacia Centro pri Kulturo kaj Turismo en Bydgoszcz... Pollando ([http://www.uea.org/agadoj/faka\\_agado.html](http://www.uea.org/agadoj/faka_agado.html), stato 12 jan 2008)

### Endoskopia filmo?

... ne maltrafu la frenezajn bilrakonton, videbla sur tiu kodisko per komputilo. (sur la akompanaj notoj de la disko *Sen lim' ĝis...* de "kompanio duoble unu"; trovis Ionel Oneț)

### Traduko el finnbugra lingvo

Ne ŝprucu vi Bugro! Ploretis la eta Ugro. (el la porinfana diafilmo *Frandema leporo*, tradukis Tibor Kristály; <http://espleono.uw.hu/dia.html>, stato 5 nov 2007)

### La evangelio laŭ Sergio

En la januara *Ondo* ... komenciĝis recenza eseo pri la nova Biblio de Sergio Pokrovskij. (AIKo, [http://groups.yahoo.com/group/La\\_Balta\\_Ondo/message/872](http://groups.yahoo.com/group/La_Balta_Ondo/message/872), 1 jan 2008)

Plukis **István Ertl**





## Perantoj de "La Ondo de Esperanto"

**Argentino:** Roberto Sartor, Beruti 2792, 3° 9, C 1425, BBF, Buenos Aires

**Aŭstrio:** Leopod Patek, Martinstr. 104/38, AT-3400 Klosterneuburg

**Aŭstralio:** Libroservo de AEA, Esperanto-domo, 143 Lawson St., Redfern N.S.W. 2016

**Belgio:** FEL, Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen

**Brazilo:** BEL, Caixa Postal 03625, Brasilia, DF 70084-970

**Britio:** EAB/Viv O'Dunne, Esperanto House, Station Road, Barlaston, Stoke-on-Trent ST12 9DE

**Bulgario:** Georgi Mihalkov, "Nadejda" V, bl. 529, vh A et 9 ap 33, BG-1229 Sofia

**Ĉeĥio:** Pavel Polnický, Na Vinici 110/10, CZ-290 01 Poděbrady

**Danlando:** Arne Casper, Bryggervangen 70, 4, tv. DK-2100 København Ø

**Estonio:** Virve Ernits, Vallimaa 17-8, EE-93812 Kuressaare

**Finnlando:** EAF / Päivi Saarinen, Siltasaarenkatu 15 C 65, FI-00530, Helsinki

**Francio:** Espéranto-France, 4 bis rue de la Cerisaie, FR-75004 Paris

**Germanio:** Wolfgang Schwanzer, Pfarrer-Seeger-Straße 9, DE-55129 Mainz

**Hispanio:** Luis Serrano Pérez, Font Nova 32, ES-08202 Sabadell

**Hungario:** Jozefo Baksa, Pf. 115, HU-8901 Zalaegerszeg KEA, p.k. 87, HU-1675 Budapest

**Irlando:** Joy Davies, 9 Templeogue Wood, Dublin 6W

**Islando:** IEA, p.k. 1081, IS-121 Reykjavík

**Italio:** IEF, Via Villoresi 38, IT-20143 Milano  
Višnja Branković, Via Parini 5, IT-34129 Trieste

**Japanio:** JEI, Waseda-mati 12-3 Sinzyuku-ku, Tōkyō-to, 162-0042

**Katalunio:** KEA, Apartat 1008, ES-08200 Sabadell

**Koreio:** KEA, 1601 Kang Byeon Hanshin Core, 350 Mapo-dong, Mapo-ku, Seoul-121-703

**Kroatio:** Marija Belošević, Sveti Duh 130, HR-10000 Zagreb

**Kroatio kaj Slovenio:** Višnja Branković (vd. Italio)

**Latvio:** Margarita Želve, Rūpniecības 35-13, LV-1045 Rīga

**Litovio:** LEA, p. k 167, LT-3000 Kaunas-C

**Nederlando:** UEA, Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam

**Norvegio:** Esperantoforlaget, Olaf Schous vei 18, NO-0572 Oslo

**Nov-Zelando:** G.David Dewar, 24 Date Crescent, Halswell, Christchurch, NZ-8025

**Pollando:** PEA, Aleja Wolności 37F/7, 33-300 Nowy Sącz

**Portugallio:** PEA, Rua João Couto, 6, R/C-A, PT-1500 Lisboa

**Ruslando:** Galina Romanovna Goreckaja, RU-236039 Kaliningrad, ab. ja. 1205

**Serbio:** Dimitrije Janičić, Svetogorska 19, 11000 Beograd

**Slovakio:** Stano Marček, Zvolenská 15, SK-03601 Martin

**Sud-Afriko:** Colin S. Beckford, 43 Fairview Crescent, Milnerton Ridge 7441

**Svedio:** Lisbet Andréasson, Kajsa Kavats gata 8, SE-242 35 Hörby

**Svislando:** Christoph Scheidegger, Im Schleedorn 6, CH-4224 Nenzlingen

**Usono:** ELNA, P. O. Box 1129, El Cerrito CA 94530



Maja antaŭsilvestre en IF-24, Düsseldorf (*Amri Wandel*)



Gaja kaj bonetosa IS-51 en Würzburg (*Aneta Będkowska*)



Armeninoj en amika rondo en Irano (*Karine Arakeljan*)



Afrika Umba en la Toruna Zamenhof -Tago (*A.Grzębowski*)





## Internacia fotoĝonkurso

*La Ondo de Esperanto* organizis en 2007 la dekan Internacian Fotokonkurson. Partoprenis 61 fotoverkoj de 18 fotoaŭtoroj el Aŭstrio, Brazilo, Britio, Germanio, Italio, Japanio, Litovio, Pollando, Ruslando kaj Serbio.

La 11an de januaro 2008 la juĝkomisiono (Andrej Budnik, Aleksander Korĵenkov, Maria Sokolova) anoncis la rezulton:

1a premio (€50 kaj abono de *La Ondo de Esperanto*): Barbara Chodera (Pollando).

2a premio (€25 kaj abono de *La Ondo de Esperanto*): Katia Miyashiro (Brazilo).

3a premio (abono de *La Ondo de Esperanto*): Gediminas Kazlauskas (Litovio) pro “Reveno al la hejmo”; Paulo Sergio Viana (Brazilo) pro “Libro: vojo”; Gianfranco Vignando (Italio) pro “Portiko kaj domo en malnova itala vilaĝeto”.

Laŭdaj mencioj: Nebojša Stankoviĉ (Serbio) pro “Konsterno-3”; Gediminas Kazlauskas (Litovio) pro “Espero vivi”; Lilija Burgar (Ruslando) pro “So-so-somero”; Mathias Bethmann (Germanio) pro “Vizito de vespo”.

Speciala premio (€50 kaj abono de *La Ondo de Esperanto*) pro la plej bona foto pri la temo *Festo*: Shoko Sakaeda (Japanio) pro “Danco de ardeoj” (vidu sur la supra foto).

Laŭdaj mencioj: Katia Miyashiro (Brazilo); Aneta Małgorzata Będkowska (Britio) pro “Aŝura-festo”.

Laŭ la regularo de la konkurso, la organizantoj ĝis la 31a de decembro 2009 havas ekskluzivan rajton uzi ĉiujn ricevitajn fotojn en papera kaj elektronika formo kaj en ekspozicioj.

*Dankon al la partoprenintoj! Gratulon al la laŭreatoj!*

Halina Gorecka  
sekretario de la konkurso